



*La
Aventuroj
de Alico
en Mirlando*

de Lewis Carroll
ilustrita de John Tenniel
tradukita de Donald Broadribb

LA AVENTUROJ DE ALICO
EN MIRLANDO



LA AVENTUROJ DE ALICO

EN MIRLANDO

DE
LEWIS CARROLL

KUN KVARDEK DU ILUSTRAĴOJ
DE JOHN TENNIEL

TRADUKITA DE
DONALD BROADRIBB

La Aventuroj de Alico en Mirlando

De Carroll, Lewis (Dodgson, Charles Lutwidge), 1832-1898

Ilustrita de Tenniel, John, 1820-1914

Tradukita el la Angla al Esperanto de Broadribb, Donald (Donald Richard), 1933-

Unue eldonita en la Angla kiel *Alice's Adventures in Wonderland* de Macmillan & Co Ltd, 1865

Unue eldonita en Esperanto kiel *Alico en Mirlando* de Bookleaf Publishing, 1996, ISBN 1-876042-05-2.

Due eldonita kiel *Alico en Mirlando* de Sezonoj (RU-620077 Jekaterinburg-77, p.k. 67, Ruslando), 1999.

Vidu <http://www.netword.com/broadribb>

Ĉi tiu traduko kopirajta © 1996 Donald Broadribb.

Ĉi tiu eldono: septembro 2000.

192 p. : ill ; 18 cm.

899.9923

La ilustraĵoj kaj aranĝo de ĉi tiu eldono laŭeble plej konformas al tiuj de la originala Angla eldono de 1865. La litertipo estas 13 sur 17 pkt De Vinne.

LISTO DE ĈAPITROJ

ĈAPITRO	PAGŬO
I. TRA LA KUNIKLOTUON	1
II. LA LAGO DE LARMOJ	15
III. VOLONTKONKURSO KAJ LONGA VOSTO	29
IV. LA KUNIKLO ENSENDAS MALGRANDAN VILĈJON	41
V. KONSILO DE RAŬPO	59
VI. PORKO KAJ PIPRO	76
VII. FRENEZA TEFESTO	95
VIII. LA KROKETLUDEJO DE LA REĜINO	112
IX. LA RAKONTO DE LA FALSĤELONIO	130
X. LA OMARA KVADRILO	147
XI. KIU ŜTELIS LA TORTETOJN?	162
XII. ATESTAS ALICO	176



ĈAPITRO I

TRA LA KUNIKLOTRUON

ALICON komencis multe tedi la sidado apud sia fratino sur la bordo de la rivereto, kaj la manko de io farinda; unu-du-foje ŝi rigardetis transŝultre la libron kiun legas ŝia fratino, sed ĝi havis nek bildojn nek

konversaciojn, “kaj kiel utilas libro,” pensis Alico, “sen bildoj aŭ konversacioj?”

Do ŝi konsideradis, en sia menso (laŭeble, ĉar la varmo donis al ŝi senton de dormemo kaj stulteco), ĉu la plezuro de preparo de lekanteto-ĉeno valorus la penon leviĝi kaj pluki la lekantetojn, kiam subite blanka kuniklo kun palruĝaj okuloj kuris tre proksime al ŝi.

Tio ne estis *vere* rimarkinda; kaj Alico ne opiniis ke estas *tre* malkutime kiam ŝi aŭdis la Kuniklon diri al si, “Ve! Ve! Mi malfruos!” (poste, kiam ŝi pripensis la aferon, ŝi opiniis ke tio ja estis mirinda, sed kiam ĝi okazis ĉio ŝajnis tute natura); sed kiam la Kuniklo eĉ *prenis horloĝeton el la poŝo de sia veŝto*, kaj rigardis ĝin, kaj poste plu kuris, Alico surpiediĝis, ĉar ŝi ekpensis ke neniam antaŭe ŝi vidis kuniklon kun veŝtopoŝo, aŭ kun horloĝeto kiun ĝi povas preni el la poŝo, kaj, plena de scivolo, ŝi kuris trans la kampon sekvante ĝin, kaj sukcesis

ĝustatempe vidi ĝin salti en grandan kuniklotruon sub la heĝo.

Post momento Alico sekvis ĝin en la truon, kaj ne eĉ unufoje pripensis kiel ŝi reeliros.

La kuniklotruo iris kelkan distancon rekte kiel tunelo, sed poste eksubeniris, tiom subite ke Alico ne havis momenton en kiu pensi pri haltigi sin antaŭ ol ŝi trovis sin falanta en kio aspektis tre profunda puto.

Aŭ la puto estis tre profunda, aŭ ŝi falis tre malrapide, ĉar ŝi havis multan tempon dum ŝi falis por ĉirkaŭrigardi, kaj por demandi al si kio poste okazos. Unue, ŝi provis malsupren rigardi por vidi al kio ŝi falas, sed estis tro obskure kaj ŝi povis vidi nenion: post tio ŝi rigardis la flankojn de la puto, kaj rimarkis ke ili estas plenaj de ŝrankoj kaj librobretoj: tie kaj tie ŝi vidis mapojn kaj bildojn pendantajn de kejlpoj. Ŝi prenis poton de unu el la bretoj dum ŝi pasis; la etiketo diris “ORANĜA

MARMELADO”, sed ĉagrenate ŝi trovis ĝin malplena: ŝi ne volis faligi la poton, timante ke tio eble mortigus iun sube, do ŝi pene metis ĝin en unu el la ŝrankoj dum ŝi falpasis ĝin.

“Nu!” pensis Alico, “post tia falo, min tute ne ĝenos fali suben sur la ŝtuparo! Kiom brava oni kredos min ĉeĥejme! Mi eĉ ne plendus se mi falus de la supro de la domo!” (Verŝajne tio ja estis vera.)

Suben, suben, suben. Ĉu la falo *neniam* ĉesos? “Kiom da kilometroj mi falis ĝis nun?” ŝi diris pervoĉe. “Sendube mi proksimiĝas al la centro de la tero. Mi kalkulu: tio signifus ke mi falis sep mil kilometrojn, mi kredas—” (ĉar sciu ke Alico lernis plurajn faktojn tiajn en siaj lecionoj en la lerneĵĉambro, kaj kvankam nun ne estis *tre* bona oportuno paradi ŝian scion, ĉar neniuj ĉeestis por aŭskulti ŝin, tamen estis bona ekzerco memori ĝin) “—jes, jen proksimume la ĝusta distanco—sed, kiun

Latitudon aŭ Longitudon mi atingis?” (Alico tute ne sciis kio estas Latitudo, nek Longitudo, sed ŝi opiniis ke ili estas tre elegantaj vortoj.)

Baldaŭ ŝi rekomencis paroli. “Ĉu eble mi falos rekte *tra* la teron? Kiom kurioze estos, eliri inter homoj kiuj marŝas kapsube! La Antipatioj, mi kredas—” (ŝin iom feliĉigis ke neniu aŭskultas *nun*, ĉar tio tute ne sonis la ĝusta vorto) “—sed mi devos demandi al ili pri la nomo de la lando, sciu. Pardonu, S-rino, ĉu mi estas en Nov-Zelando aŭ en Aŭstralio?” (kaj ŝi provis riverenci dum ŝi falis—imagu, *riverenci* falante tra la aero! Ĉu vi kredas ke vi kapablu?) “Kaj kia stulta knabineto ŝi opinios min pro tia demando! Ne, tute ne taŭgos demandi: eble mi vidos la nomon sur afiŝo ie.”

Suben, suben, suben. Nenio alia estis farebla, do Alico baldaŭ rekomencis paroli. “Dina vere demandas al si kie mi estas hodiaŭ vespere, mi kredas!” (Dina estis la kato.) “Mi esperas ke ili memoros ŝian

teleron da lakto je ŝia vespermanĝo. Dina, kara! Mi multe volas vin ĉi tie kun mi! Ne estas musoj en la aero, vere, sed eble vi kaptus vesperton, kaj tio estas tre simila al muso, sciu. Sed ĉu katoj manĝas vespertojn, ĉu?” Kaj nun Alico komencis fariĝi tre laca, kaj ŝi daŭre ripetis al si, kvazaŭ songante, “Ĉu katoj manĝas vespertojn? Ĉu katoj manĝas vespertojn?” kaj kelkfoje, “Ĉu vespertoj manĝas katojn?” ĉar, komprenu, ŝi povis respondi nek la unuan formon de la demando nek la alian, do ne multe gravis kia ŝi faris ĝin. Ŝi sentis sin endormiĝi, kaj ĵus komencis sonĝi ke ŝi marŝas man'-en-mane kun Dina, kaj diras al ŝi, tre serioze, “Nu, Dina, diru al mi la veron: ĉu vi iam manĝis vesperton?” kiam subite, tump! tump! ŝi trafis amason da branĉetoj kaj sekaj folioj, kaj la falo ĉesis.

Alico tute ne estis vundita, kaj ŝi eksaltis sur siajn piedojn post nur momento: ŝi supren rigardis, sed estis tute obskure supre:

antaŭ ŝi estis alia longa irejo, kaj la Blanka Kuniklo estis ankoraŭ videbla rapide marŝante tra ĝi. Necesis perdi eĉ ne momenton: Alico kuris kiel la vento, kaj estis ĝustatempa por aŭdi ĝin diri, dum ĝi ĉirkaŭiris angulon, “Ho je miaj oreloj kaj vangharoj, kiom malfruiĝas!” Ŝi estis proksima malantaŭ ĝi kiam ŝi ĉirkaŭiris la angulon, sed la Kuniklo ne plu estis videbla: ŝi trovis sin en longa, malalta koridoro, kiun lumigis vico de lampoj pendantaj de la tegmento.

Estis pordoj tute ĉirkaŭ la koridoro, sed ĉiuj estis ŝlositaj: kaj kiam Alico laŭiris la longon de unu flanko kaj poste de la alia, provante ĉiun pordon, ŝi marŝis malfeliĉe laŭ la centro, demandante al si kiel ŝi sukcesos eliri.

Subite ŝi trovis malgrandan trikruran tablon, tute el solida vitro: estis nenio sur ĝi escepte de malgranda ora ŝlosilo, kaj la unua penso de Alico estis ke eble ĝi apartenas al unu el la pordoj de la koridoro; sed, vel,

aŭ la seruroj estis tro grandaj, aŭ la ŝlosilo estis tro malgranda, sed ĉiuokaze ĝi ne malfermis iun el ili. Tamen, ĉirkaŭirante la duan fojon, ŝi trovis malaltan kurtenon kiun



ŝi antaŭe ne rimarkis, kaj malantaŭ ĝi estis malgranda pordo ĉirkaŭ kvardek centimetrojn alta: ŝi provis la malgrandan oran ŝlosilon

en la seruro, kaj ŝi ĝoje trovis ĝin ĝusta!

Alico malfermis la pordon kaj trovis ke ĝi kondukas al malgranda trairejo, ne multe pli granda ol ratotruo: ŝi surgenuiĝis kaj rigardis laŭlonge de la trairejo en la plej belan ĝardenon iam viditan. Kiom ŝi sopiris eliri el tiu obskura koridoro, kaj vagi inter

tiuj bedoj de brilantaj floroj kaj tiuj malvarmaj fontoj, sed ŝi ne povis puŝi eĉ sian kapon tra la pordejon; “kaj eĉ se mia kapo ja trairus,” pensis kompatinda Alico, “apenaŭ utilis sen miaj ŝultroj. Ho, kiom mi volonte fermiĝus kiel teleskopo! Mi kredas ke mi povus, se nur mi sci-povus komenci.” Ĉar, komprenu, tiom da kontraŭkutimaj eventoj okazis lastatempe ke Alico komencis kredi ke vere tre malmulto estas malebla.

Ŝajne ne utilis atendi apud la malgranda pordo, do ŝi reiris al la tablo, duone esperante trovi ankoraŭ alian ŝlosilon sur ĝi, aŭ almenaŭ libron de reguloj por fermi homojn kiel teleskopojn: ĉifoje ŝi trovis malgrandan botelon sur ĝi (“kiu certe ne estis tie antaŭe,” diris Alico), kaj ligita ĉirkaŭ la kolo de la botelo estis papera etiketo sur kiu la vortoj “TRINKU MIN” estis bele presitaj per grandaj literoj.

Estis tute bone diri “Trinku min”, sed saĝa malgranda Alico ne intencis fari *tion*

rapide. “Ne, unue mi rigardos,” ŝi diris, “por vidi ĉu diriĝas *‘veneno’*,” ĉar ŝi legis plurajn belajn rakontetojn pri infanoj kiuj bruliĝis, kaj kiujn manĝis sovaĝaj bestoj, kaj aliaj malplaĉaj temoj, nur ĉar ili *rifuzis* memori la simplajn regulojn instruitajn al ili de iliaj amikoj; ekzemple, ke ruĝarda fajrostango bruligas se oni tro longe tenas ĝin; kaj ke, se oni tranĉas fingron *tre* profunde per tranĉilo, kutime ĝi sangas; kaj ŝi neniam forgesis ke, se oni trinkas tro el botelo signita “veneno”, preskaŭ certe ĝi montriĝos malsaniga, pli aŭ malpli frue.

Tamen tiu botelo *ne* estis signita



“veneno”, do Alico kuraĝis gustumi ĝin, kaj, trovinte ĝin tre plaĉa (efektive ĝi gustis iom kiel miksaĵo de ĉeriza torto, kustardo, ananaso, rostita meleagraĵo, melasa sukeraĵo, kaj varma buterumita toasto), ŝi tre rapide plenmanĝis ĝin.

* * * *

 * * *

* * * *

“Kia kurioza sento!” diris Alico; “certe mi fermiĝas kiel teleskopo!”

Kaj tiel ja estis: ŝi nun estis nur dudek kvin centimetrojn alta, kaj ŝia vizaĝo lumiĝis pro la penso ke nun ŝi estas ĝuste granda por trairi la malgrandan pordon en tiun belan ĝardenon. Unue, tamen, ŝi atendis kelkajn minutojn por trovi ĉu ŝi pli ŝrumpas: ŝi estis iom nervoza pri tio; “ĉar eble,” diris Alico al si, “mi fine tute estingiĝos, kiel kandelo. Kia mi estus tiam?” Kaj ŝi penis imagi kia estas la flamo post la estingiĝo de la kandelo, ĉar ŝi ne povis

memori iam vidi ion tian.

Post kelka tempo, trovinte ke nenio plia okazis, ŝi decidis tuj eniri la ĝardenon; sed ve, kompatinda Alico! kiam ŝi atingis la pordon, ŝi trovis ke ŝi forgesis la malgrandan oran ŝlosilon, kaj kiam ŝi reiris al la tablo por preni ĝin, ŝi trovis ke ŝi tute ne povas atingi ĝin: ŝi povis tute klare vidi ĝin tra la vitro, kaj ŝi penegis grimpi unu el la kruroj de la tablo, sed ĝi estis tro glitiga; kaj kiam ŝi lacigis sin per penado, la kompatinda uleto sidiĝis kaj ploris.

“Ĉit! ne utilas plori tiel!” diris Alico al si, iom malafable. “Mi konsilas ke vi ĉesu plori jam tuj!” Ŝi kutime tre bone konsilis sin, (kvankam ŝi tre malofte obeis la konsilon), kaj kelkfoje ŝi tiom severe riproĉis sin ke larmoj estiĝis en ŝiaj okuloj; kaj ŝi memoris ke unufoje ŝi klopodis frapi la proprajn orelojn ĉar ŝi malhoneste ludis dum kroketa konkurso kontraŭ si mem,

ĉar tiu kurioza infano tre amis ludi ke ŝi estas du personoj. “Sed ne utilas nun,” pensis kompatinda Alico, “ludi ke mi estas du personoj! Ho, apenaŭ restas sufiĉe da mi por konsistigi *unu* respektindan personon!”

Baldaŭ ŝia okulo ekvidis malgrandan vitran keston kuŝantan sub la tablo: ŝi malfermis ĝin, kaj trovis en ĝi tre malgrandan kukon, sur kiu la vortoj “MANĜU MIN” estis bele signitaj per riboj. “Nu, mi manĝos ĝin,” diris Alico, “kaj se ĝi pligrandigos min, mi povos atingi la ŝlosilon; kaj se ĝi malpligrandigos min, mi povos rampi sub la pordon; do laŭ ambaŭ manieroj mi povos eniri la ĝardenon, kaj ne gravas al mi kiu el ili okazos!”

Ŝi manĝis iometon, kaj diris maltrankvile al si “Ĉu supren? Ĉu malsupren?” tenante manon sur la supro de sia kapo por senti kiudirekten ŝi kreskas; kaj ŝin tre surprizis trovi ke ŝi restas same granda. Kompreneble, tio kutime okazas kiam oni manĝas kukon;

sed Alico jam kutimiĝis atendi nur strangajn eventojn, kaj ŝajnis tre enuige kaj stulte ke la vivo plu okazas laŭkutime.

Do ŝi ekis pli manĝi, kaj tre baldaŭ plenmanĝis la kukon.

* * * *

* * *

* * *



ĈAPITRO II

LA LAGO DE LARMOJ

“Kuriozige kurioziĝa!” kriis Alico (ŝin tiom surprizis, ke dum momento ŝi plene forgesis paroli laŭgramatike; “nun mi malfermiĝas kiel la plej granda teleskopo iam ekzistinta! Adiaŭ, piedoj!” (ĉar kiam ŝi rigardis siajn piedojn, ili aspektis preskaŭ nevideblaj, ĉar ili fariĝis tiom malproksimaj).

“Ho, miaj karaj kompatindaj piedoj. Kiu surmetos viajn ŝuojn kaj ŝtumpojn por vi nun, karuloj? *Mi* certe ne povos! Mi estos multe tro distanca por ĝeni min pri vi: vi devos prizorgi vin mem laŭeble—sed mi nepre estu afabla al ili,” pensis Alico, “ĉar eble ili rifuzos marŝi kien mi volas! Mi pensu: mi donos al ili novan paron da botoj ĉiun Kristnaskon.”

Kaj ŝi plu pensis, planante kiel ŝi faros tion. “Mi devos sendi ilin per kuriero,” ŝi pensis; “kaj kiom strange estos, sendi donacojn al miaj propraj piedoj! Kaj kiom strange aspektos la adreso!

*Al S-ro Dekstra Piedo de Alico,
Kamentapiŝo,
apud la Kamenŝirmilo,
(kun amo, de Alico).*

Ho ve, kiajn absurdaĵojn mi diras!”

Ĝuste tiumomente ŝia kapo frapis la tegmenton de la koridoro: efektive ŝi nun estis iom pli ol tri metrojn alta, kaj ŝi tuj prenis la malgrandan oran ŝlosilon kaj rapide iris al

la pordo de la ĝardeno.

Kompatinda Alico! Ŝi nur malfacile sukcesis kuŝiĝi sur unu flanko kaj rigardi en la ĝardenon per unu okulo; sed trairi, nu tio estis eĉ pli senespera celo ol antaŭe: ŝi sidiĝis kaj rekomencis plori.

“Hontu!” diris Alico, “granda knabino kia vi,” (ŝi certe ne mensogis dirante tion!), “ploranta tiel! Ĉesu jam nun, mi diras al vi!” Sed ŝi plu ploradis malgraŭe, plorante litrojn da larmoj, ĝis estis granda lago ĉirkaŭ ŝi, proksimume dek centrimetrojn profunda kaj etendiĝanta tra duono de la koridoro.

Post kelka tempo ŝi aŭdis nelaŭtan paŝadon de piedoj iom distancaj, kaj ŝi rapide sekigis siajn okulojn por vidi kio venas. Estis la Blanka Kuniklo revenanta, elegante vestita, kun paro da blankaj kapridhaŭtaj gantoj en unu mano kaj granda ventumilo en la alia: li trotadis tre rapide, murmurante al si dum li venis, “Ho! la Dukino, la Dukino! Ho! vere ŝi estos furioza ĉar mi atendigis ŝin!” Alico



sentis sin tiom senpova ke ŝi estis preta peti helpon de iu ajn; do, kiam la Kuniklo proksimiĝis, ŝi komencis diri per nelaŭta, timeta voĉo, “Bonvolu, sinjoro—” La Kuniklo ekstremis, faligis la blankajn kapridhaŭtajn

gantojn kaj la ventumilon, kaj forkuris en la obskuron kiel eble plej rapide.

Alico prenis la ventumilon kaj la gantojn, kaj, ĉar la koridoro estis tre varma, ŝi ventumadis sin dum ŝi paroladis: “Ve, ve! Kiom stranga estas ĉio hodiaŭ! Kaj hieraŭ ĉio estis tute kutima. Ĉu eble mi ŝanĝiĝis dum la nokto? Mi pensu: ĉu mi mem estis la sama persono kiam mi vekiĝis ĉimatene? Mi preskaŭ kredas memori ke mi estis iomete diferenca. Se mi ne estas la sama, la demando estas, Kiu en la mondo mi estas? Ha, *jen* la granda enigmo!” Kaj ŝi komencis pensi pri ĉiuj infanoj kiujn ŝi konas kiuj estas samaĝaj kiel ŝi, por trovi ĉu eble ŝi ŝanĝiĝis en iun el ili.

“Mi certas ke mi ne estas Ada,” ŝi diris, “ĉar ŝia hararo estas tre bukla, kaj mia tute ne havas buklojn; kaj mi certas ke mi ne povas esti Mabel, ĉar mi scias ĉiajn aferojn, kaj ŝi, ho! ŝi scias vere malmulton! Krome, ŝi estas ŝi, kaj *mi* estas mi, kaj—ve, kia enigmo estas! Mi provu memori ĉu mi scias

kion mi antaŭe sciis. Mi pensu: kvaroble kvin estas dek du, kaj kvaroble ses estas dek tri, kaj kvaroble sep estas—ve! Mi neniam atingos dudek tiel! Tamen, la Obla Tabelo ne gravas: ni provu Geografion. Londono estas la ĉefurbo de Parizo, kaj Parizo estas la ĉefurbo de Romo, kaj Romo—ne, *tio* estas tute erara. Evidente mi ŝanĝiĝis en Mabelon! Mi provu diri ‘*Ĉar jen l’ abelo laborema*’—” kaj ŝi krucis siajn manojn sur siaj genuoj, kvazaŭ recitante lecionojn, kaj komencis deklami ĝin, sed ŝia voĉo sonis raŭka kaj stranga, kaj la vortoj ne estis samaj kiel iam antaŭe:—

*Ĉar jen la eta krokodil’
 Beligas sian voston,
 Kaj verŝas akvon de la Nil’
 Sur ĉiun oran oston!*

*Feliĉe sonas lia rid’
 Por kaŝi lian celon,
 kaj fiŝoj do kun plena fid’
 transnaĝas la makzelon!*

“Mi estas certa ke tiuj vortoj ne estas ĝustaj,” diris kompatinda Alico, kaj ŝiaj okuloj repleniĝis per larmoj dum ŝi daŭrigis. “Nepre mi ja estas Mabel, kaj mi devos loĝi en tiu aĉa dometo, kaj ludi per preskaŭ neniuj ludiloj, kaj lerni, ho!, tiom da lecionoj! Ne, mi firme decidis; se mi estas Mabel, mi restos ĉi tie! Ne utilos al ili subpuŝi siajn kapojn kaj diri, ‘Revenu supren, kara!’ Mi nur suprenrigardos kaj diros, ‘Nu, kiu mi estas? Unue diru al mi tion, kaj se al mi plaĉas esti tiu persono, mi supreniros: se ne, mi restos ĉi tie ĝis mi fariĝos iu alia’—sed ve!” kriis Alico, ekplorante, “mi volegas ke ili ja subpuŝu siajn kapojn! Min *plene* tedas esti tute sola ĉi tie!”

Dirante tion, ŝi rigardis siajn manojn, kaj ŝin surprizis vidi ke ŝi surmetis unu el la malgrandaj blankaj kapridhaŭtaj gantoj dum ŝi parolis. “Kiel mi *povis* fari tion?” ŝi pensis. “Ŝajnas ke mi denove malgrandiĝas.” Ŝi surpiediĝis kaj iris al la tablo por mezuri

sin per ĝi, kaj trovis ke, laŭ sia plej bona takso, ŝi nun estas proksimume sesdek centimetrojn alta, kaj plu ŝrumpas tre rapide: ŝi baldaŭ trovis ke la kaŭzo estas la ventumilo kiun ŝi tenas, kaj ŝi haste faligis ĝin, nur sufiĉatempe por eviti plenan forŝrumpo.

“Mi preskaŭ *ne* eskapis!” diris Alico, multe timante pro la subita ŝanĝo, sed tre ĝoja ĉar ŝi plu ekzistas; “kaj nun al la ĝardeno!” Kaj ŝi rekuris plenrapide al la malgranda pordo: sed, ve! la malgranda pordo denove estis fermita, kaj la malgranda ora ŝlosilo kuŝis denove sur la vitra tablo, “kaj nun estas eĉ pli malbone,” pensis la kompatinda infano, “ĉar neniam mi estis tiom malgranda, neniam! Kaj mi diras ke estas domaĝe, tion mi diras!”

Dum ŝi diris tiujn vortojn ŝia piedo glitis, kaj post momento, plaŝ! salakvo kovris ŝin ĝis ŝia mentono. Ŝia unua penso estis ke iel ŝi falis en la maron, “kaj tiuokaze



mi povos reiri per la fervojo,” ŝi diris al si. (Alico nur unufoje dum sia vivo estis ĉe la marbordo, kaj faris ĝeneralan konkludon ke negrave kien oni iras sur la Angla marbordo, oni trovas aron da vestokabanetoj en la maro, diversajn infanojn kiuj fosas en la sablo per lignaj ŝpatoj; post tio, vico de pensionoj, kaj malantaŭ ili trajnstacion.) Tamen ŝi baldaŭ komprenis ke ŝi estas en la lago de larmoj kiujn ŝi ploris kiam ŝi estis tri metrojn alta.

“Ho, ke mi ne estus tiom plorinta!” diris Alico, dum ŝi ĉirkaŭnaĝis, penante

trovi elirejon. “Nun mi puniĝas, mi supozas, per drono en miaj propraj larmoj! Tio ja estos strangaĵo, tute certe! Tamen, ĉio estas stranga hodiaŭ.”

Ĝuste tiam ŝi aŭdis ion plaŭdantan en la lago ne tre multe for, kaj ŝi naĝis pli proksimen por trovi kio ĝi estas: unue ŝi pensis ke sendube ĝi estas rosmaro aŭ hipopotamo, sed baldaŭ ŝi memoris kiom malgranda ŝi nun estas, kaj post nelonge ŝi povis vidi ke ĝi estas nur muso, kiu englitis same kiel ŝi.

“Ĉu iel utilis,” pensis Alico, “paroli al tiu muso? Ĉio estas tiom nekutima ĉi tie, ke verŝajne ĝi ja povas paroli: negrave, ne malutilos provi.” Do ŝi komencis: “Ho Muso, ĉu vi scias kiel eliri el ĉi tiu lago? Min tre lacigas naĝado ĉi tie, Ho Muso!” (Alico supozis ke tiel oni devas paroli al muso: ŝi neniam antaŭe faris tion, sed ŝi memoris ke ŝi vidis, en Latina Gramatiklibro de sia frato, “Muso—de muso—al muso—

muson—Ho muso!”) La muso rigardis ŝin iom dubeme, kaj ŝajnis al ŝi ke ĝi palpebrumis per unu el siaj okuletoj, sed ĝi diris nenion.

“Eble ĝi ne komprenas,” pensis Alico; “verŝajne ĝi estas Franca muso, veninta kun Vilhelmo la Konkerinto¹.” (Ĉar, malgraŭ sia scio pri historio, Alico tute ne klare konceptis antaŭ kiom da jaroj io okazis.) Do ŝi rekomencis: “Où est ma chatte?”² tio estis la unua frazo en ŝia lernolibro de la Franca lingvo. La Muso eksaltis el la akvo, kaj ĝia tuta korpo ŝajnis timtremi. “Ho, mi petas pardonon!” kriis Alico tuj, timante ke ŝi vundis la sentojn de la kompatinda besto. “Mi tute forgesis ke vi ne amas katojn.”


“Ne amas katojn!” kriis la Muso, per akra, pasia voĉo. “Ĉu *vi* amus katojn se vi estus mi?”

“Nu, eble ne,” diris Alico per trankviliga tono: “ne koleru. Sed mi vere deziras povi

¹ Vilhelmo I, alnomata Vilhelmo la Konkerinto, estis reganto de Normandio kiu konkeris Anglion en la jaro 1066.

² “Kie estas mia kato?”

montri al vi nian katon Dina: mi kredas ke vi ŝatus katojn se vi povus vidi ŝin. Ŝi estas tre kara, kvieta besto,” Alico daŭrigis, duone parolante al si, dum ŝi



naĝis leĝere en la lago, “kaj ŝi sidas ronronante tre bele apud la kameno, lekante siajn piedojn kaj lavante sian vizaĝon—kaj estas tre plezure karesi ŝin—kaj ŝi bonege kaptas musojn—ho, bonvolu pardoni!” kriis Alico denove, ĉar ĉifoje la Muso tremegis, kaj ŝi sentis ke nepre ŝi ofendis ĝin. “Ni

ne plu diskutos ŝin se vi preferas ke ne.”


“Ni, ĉu!” kriis la Muso, kiu tremis tutkorpe ĝis la pinto de sia vosto. “Ĉu vi kredas ke *mi* akceptus paroli pri tia temo? Nia familio de ĉiam *malamas* katojn: fiaj, aĉaj, maldecaj bestoj! Neniam diru tiun nomon al mi denove!”

“Tute ne!” diris Alico, rapidante ŝanĝi la temon de la konversacio. “Ĉu vi—ĉu vi amas—amas—amas hundojn?” La Muso ne respondis, do Alico plu parolis fervore: “Estas vere kara hundeto proksime al nia domo, mi volonte montrus al vi! Malgranda helokula terhundo, sciu, kun ho! tre longaj bukaj brunaj haroj! Kaj ĝi reportas aĵojn kiujn oni ĵetas, kaj ĝi sidiĝas kaj petas sian manĝon, kaj faras ĉiajn aferojn—mi eĉ ne povas memori multajn el ili—kaj ĝi apartenas al kultivisto, sciu, kaj li diras ke ĝi estas ege utila, ĝi valoras cent pundojn! Li diras ke ĝi mortigas ĉiujn ratojn kaj—ho, ve!” kriis Alico lamente.

“Mi kredas ke denove mi ofendis ĝin!” Ĉar la Muso fornaĝadis de ŝi kiel eble plej forte, kaj faris grandan brukonfuzon en la lago dum ĝi naĝis.

Do ŝi vokis al ĝi moltone: “Muso kara! Bonvolu reveni, kaj ni ne diskutos katojn, nek hundojn, se vi ne amas ilin!” Aŭdinte tion, la Muso turnis sin kaj malrapide renaĝis al ŝi: ĝia vizaĝo estis tute pala (pro pasio, Alico pensis), kaj ĝi diris, per nelaŭta, trema voĉo, “Ni iru al la bordo, kaj tie mi rakontos al vi mian historion, kaj vi komprenos kial mi malamas katojn kaj hundojn.”

Ili ja ĝustatempe foriris, ĉar la lago fariĝis tre plena de birdoj kaj bestoj falintaj en ĝin: estis Anaso kaj Dido, Lorio kaj Agleto, kaj pluraj aliaj kuriozaj bestoj. Alico gvidis, kaj la tuta grupo naĝis al la bordo.



ĈAPITRO III

VOLONTKONKURSO KAJ LONGA VOSTO

LA grupo kiu kuniĝis sur la bordo vere estis kuriozaspekta—la birdoj kun kotkovritaj plumoj, la bestoj kies felo premiĝis plate sur la haŭto, kaj ĉiuj gutis pro malsekeco, kaj estis malafablaj, kaj malkomfortaj.

La unua temo, kompreneble, estis kiel resekiĝi: ili interparolis pri tio, kaj post kelkaj

minutoj ŝajnis tre nature ke Alico trovas sin familiare konversacianta kun ili, kvazaŭ koninte ilin dum sia tuta vivo. Efektive, ŝi tre longe kverelis kun la Lorio, kiu fine komencis paŭti, kaj diris nur, “Mi estas pli aĝa ol vi, do mi pli multon scias,” kaj tion Alico ne akceptis, ĉar ŝi ne sciis kiom aĝa ĝi estas; kaj, ĉar la Lorio persiste rifuzis informi pri sia aĝo, nenio pli estis direbla.

Fine la Muso, kiu ŝajnis persono tre aŭtoritata inter ili, vokis, “Sidiĝu, ĉiuj, kaj aŭskultu min! *Mi* baldaŭ sufiĉe sekigos vin!” Ĉiuj tuj sidiĝis, en granda cirklo, kun la Muso en la centro. Alico fikse rigardis ĝin, ĉar ŝi estis certa ke ŝi baldaŭ malvarmumos se ŝi ne rapide sekiĝos.

“Ahem!” diris la Muso tre aplombe; “ĉu ĉiuj estas pretaj? Jen la plej seka historio kiun mi konas. Silentu ĉiuj, bonvole! ‘Vilhelmo la Konkerinto, kies celon favoris la papo, baldaŭ trovis subtenon de la Angloj, kiuj volis gvidistojn, kaj kiuj lastatempe multe

kutimiĝis al uzurpado kaj konkerado. Edvino kaj Morkaro, la grafoj de Mercio kaj Nortumbrio—’”

“Uf!” diris la Lorio, tremante pro malvarmo.

“Pardonu!” diris la Muso, sulkigante la frunton sed tre ĝentile. “Ĉu vi parolis?”

“Ne mi!” diris la Lorio, rapide.

“Mi kredis ke jes,” diris la Muso. “Mi daŭrigas. ‘Edvino kaj Morkaro, la grafoj de Mercio kaj Nortumbrio, deklaris sin por li; kaj eĉ Stigando, la patriota ĉefepiskopo de Kanterburio, trovis konsilinde—’”

“Trovis *kion*?” diris la Anaso.

“*Trovis*,” la Muso respondis iom kolere: “certe vi scias kion signifas ‘trovi’.”

“Mi scias kion ĝi signifas, kiam *mi* trovas ion,” diris la Anaso: “kutime ranon aŭ vermon. Mia demando estas: kion trovis la ĉefepiskopo?”

La Muso ne rimarkis tiun demandon, sed rapidis daŭrigi, “—trovis konsilinde akompani Edgaron Atelingon por renkonti Vilhelmon

kaj proponi al li la kronon. La konduto de Vilhelmo unue estis modera. Sed la insolenteco de liaj Normandoj—' Kiel estas nun, kara?" ĝi daŭrigis, turnante sin al Alico dum ĝi parolis.

"Ankoraŭ plene malseka," diris Alico melankolie: "via rakonto ŝajne tute ne sekigas min."

"Tiuokaze," diris la Dido solene, surpiediĝante, "mi proponas ke la kunveno provizore prokrastiĝu, por la tuja adopto de pli energiaj rimedoj—"

"Parolu klare!" diris la Agleto. "Mi ne komprenas kion signifas duono de tiuj grandaj vortoj, kaj, krome, mi ne kredas ke vi mem komprenas ilin!" Kaj la Agleto klinis sian kapon por kaŝi rideton: kelkaj el la aliaj birdoj pepis aŭdeble.

"Mi intencis diri," diris la Dido per ofendita tono, "ke la plej bona metodo sekiĝi estus Volontvetkuro."

"Kio *estas* Volontvetkuro?" diris Alico; ŝi

ne vere volis scii, sed la Dido paŭzis kvazaŭ kredante ke *iu* devas paroli, kaj neniuj alia ŝajne inklinitis ion diri.

“Nu,” diris la Dido, “la plej bona klarigo estas ago.” (Kaj, ĉar vi mem eble volos provi ĝin, dum iu vintra tago, mi rakontos al vi pri kiel la Dido okazigis ĝin.)

Unue ĝi markis vetkurovojon, pli-malpli cirklan (“la preciza formo ne gravas,” ĝi diris), kaj starigis ĉiujn grupanojn diversloke sur la kurejo, tie kaj tie. Ne aŭdiĝis ia “Unu, du, tri, kuru!” sed ili komencis kuri laŭvole, kaj ĉesis kuri laŭvole, tiel ke estis malfacile scii ĝuste kiam la konkurso finiĝis. Tamen, post ĉirkaŭ duonhoro da kurado, kiam ili estis tute sekaj, la Dido subite vokis, “La konkurso finiĝis!” kaj ili ĉiuj grupiĝis ĉirkaŭ lin, anhelante, kaj demandante, “Sed kiu venkis?”

Tiun demandon la Dido ne povis respondi sen multa pensado, kaj ĝi staris longatempe kun unu fingro premita al lia frunto, (la

pozicio de Ŝekspiro en liaj bildoj), dum la aliaj atendis silente. Fine la Dido diris, “*Ĉiuj* venkis, kaj *ĉiuj* ricevu premiojn.”

“Sed kiu donos la premiojn?” granda ĥoro da voĉoj demandis.

“Nu, *ŝi*, kompreneble,” diris la Dido, indikante Alicon per unu fingro; kaj la tuta grupo tuj ĉirkaŭis ŝin, vokante, konfuzite, “Premiojn! Premiojn!”

Alico tute ne sciis kion fari, kaj senespere ŝi metis manon en sian poŝon, kaj eltiris skatoleton da kandaj fruktopecoj (bonsance la salakvo ne eniris ĝin), kaj disdonis ilin kiel premiojn. Estis sufiĉe por precize unu peco por *ĉiu*.

“Sed ŝi mem devas ricevi premion, sciuj,” diris la Muso.

“Kompreneble,” la Dido respondis tre solene. “Kion alian vi havas en via poŝo?” ĝi pludiris, turninte sin al Alico.

“Nur fingringon,” diris Alico malfeliĉe.

“Transdonu ĝin,” diris la Dido.



Ili ĉiuj regrupiĝis ĉirkaŭ ŝi, dum la Dido solene prezentis la fingringon, dirante, “Ni petas ke vi akceptu ĉi tiun elegantan fingringon,” kaj, kiam ĝi finis tiun mallongan prezentoparolon, ĉiuj hurais.

Alico opiniis la tutan aferon tre absurda, sed ĉiuj aspektis tiom solenaj ke ŝi ne kuraĝis ridi; kaj, ĉar ŝi ne povis elpensi kion diri, ŝi nur klinis sin kaj prenis la fingringon, aspektante laŭeble plej solena.

La sekva tasko estis manĝi la kandajn fruktopecojn: tio kaŭzis iom da bruoj kaj konfuzo, ĉar la pli grandaj birdoj plendis ke ili ne povas trovi guston en siaj, kaj la malgrandaj sufoketis kaj necesis frapi iliajn dorsojn. Tamen, tio finiĝis post iom, kaj ili residiĝis cirkle, kaj petis ke la Muso plu rakontu al ili.

“Vi promesis diri al mi vian historion, sciuj,” diris Alico, “kaj kial vi malamas—K kaj H,” ŝi aldonis flustre, iom timante ke ĝi denove ofendiĝos.

“Mia estas longa kaj malfeliĉa!” diris la Muso, turnante sin al Alico, kaj ĝemante.

Sed Alico ekrimarkis la voston de la Muso miroplene, kaj gapis al ĝi: “Longa, certe, sed kial vi nomas ĝin malfeliĉa?” Kaj ŝi plu cerbumis dum la Muso parolis, tiel ke ŝia

koncepto pri la rakonto estis ĉi tia:—

“Furio diris al
 muso, Renkontita
 en buso, “Vi
 kuniru al juĝo:
Mi akuzos
vin tie.—
 Kaj ne
 diru rifuzon;
 Mi bezonas
 amuzon:
 Do ne
 agu defie.”
 Diris Mus’
 al la
 hundo,
 “Vi ne
 venus
 al fundo,
 Sen
 juĝist’
 kaj ĵurio,
 Kara
 stulta
 Furio.”
 “*Mi*
 ’stos
 ĵurio,
 juĝisto;
 Mi
 eĉ
 ludos
 mefisto,
 Kiel
 profeto
 de l’
 sorto.
 Mi vin
 kondam-
 nos al
 mor-
 to.”

“Vi ne atentas!” diris la Muso al Alico severe. “Pri kio vi pensas?”

“Bonvolu pardoni,” diris Alico tre humile; “vi atingis la kvinan kurbiĝon, mi kredas?”

“Vi ne aŭskultas mian *odon!*” kriis la Muso, akre kaj tre kolere.

“Nodon!” diris Alico, fervora esti utila, kaj ĉirkaŭrigardante malkviete. “Ho, lasu min helpi malligi ĝin!”

“Mi faros tute nenion tian,” diris la Muso, leviĝante kaj formarŝante. “Vi insultas min, parolante tiajn absurdaĵojn!”

“Mi ne intencis insulti!” pledis kompatinda Alico. “Sed vi ege facile ofendiĝas, sciu.”

La Muso nur grumblis responde.

“Bonvolu reveni kaj fini vian rakonton!” Alico vokis; kaj la aliaj ĉiuj diris ĥore, “Jes, bonvolu!” sed la Muso nur rifuze skuis sian kapon senpacience, kaj marŝis iom pli rapide.

“Ja domaĝe ke ĝi rifuzis resti!” ĝemis la Lorio, tuj kiam ĝi estis plene ne plu

videbla; kaj maljuna krabo uzis la oportunon por diri al sia filino, “Ha, kara! Tio instruu al vi ke *vi* neniam trokoleriĝu!” “Ĉit, Panjo!” diris la juna krabo, iom mordeme. “Vi eĉ eltrivus la paciencon de ostro!”

“Mi volontege havus Dinan ĉi tie, mi scias tion!” diris Alico pervoĉe, parolante al neniuj specifa. “Ŝi baldaŭ reportus ĝin!”

“Kaj kiu estas Dina, se mi rajtas demandi tion?” diris la Lorio.

Alico respondis volonte, ĉar ŝi estis ĉiam preta paroli pri sia amata besto. “Dina estas nia kato. Kaj ŝi estas lertega pri kaptado de musoj, vi ne povas imagi tion! Kaj ho, se vi nur povus vidi ŝin ĉasi la birdojn! Nu, ŝi manĝas birdon apenaŭ vidinte ĝin!”

Tiu parolo kaŭzis rimarkindan sensacion en la grupo. Kelkaj maljunaj birdoj forrapidis tuj: unu maljuna pigo komencis surmeti mantelon tre zorge, komentante, “Mi vere

devas reiri hejmen; la noktaero damaĝas mian gorĝon!” kaj kanario vokis per tremanta voĉo al siaj infanoj, “Forvenu, karuloj! Jam estas horo ke vi ĉiuj estu en la lito!” Diverspretekste ili ĉiuj foriris, kaj Alico baldaŭ restis sola.

“Kial mi menciis Dinan!” ŝi diris al si per melankolia tono. “Ŝajne neniu amas ŝin ĉi tie, kvankam mi estas certa ke ŝi estas la plej bona kato en la mondo! Ho, mia kara Dina! Ĉu iam mi revidos vin?” Kaj nun kompatinda Alico rekomencis plori, ĉar ŝi sentis sin tre soleca kaj senfeliĉa. Post nelonge, tamen, ŝi denove aŭdis etan sonon de paŝoj el for, kaj ŝi espereme suprenrigardis, duone esperante ke la Muso pentis kaj revenas por fini sian rakonton.

ĈAPITRO IV

LA KUNIKLO ENSENDAS MALGRANDAN VILĈJON

VENIS la Blanka Kuniklo, malrapide trotante, kaj rigardante malkviete dum ĝi iris, kvazaŭ perdinte ion; kaj ŝi aŭdis ĝin murmuradi al si, “La Dukino! La Dukino! Ho miaj karaj piedoj! Ho miaj felo kaj lipharoj! Ŝi ekzekutigos min, tiel certe kiel musteloj estas musteloj! Kie do mi faligis ilin, *kie?*” Alico preskaŭ tuj divenis ke ĝi serĉas la ventumilon kaj la paron da blankaj kapridhaŭtaj gantoj, kaj ŝi tre kompleze komencis serĉi ilin, sed ili nenie estis videblaj—ŝajne ĉio ŝanĝiĝis post ŝia

naĝo en la lago, kaj la granda koridoro, kun la vitra tablo kaj la malgranda pordo, tute malaperis.

Tre baldaŭ la Kuniklo rimarkis Alicon, dum ŝi serĉadis, kaj vokis al ŝi, kolertone, “Nu, Mari-Ann, *kion* vi faras ĉi tie? Kuru hejmen jam nun kaj portu al mi paron da gantoj kaj ventumilon! Rapide, iru!” Kaj Alico tiom timis ke ŝi tuj forkuris laŭ la direkto kiun ĝi indikis, sen provi klarigi la eraron kiun ĝi faris.

“Li supozis min sia domservistino,” ŝi diris al si dum ŝi kuris. “Kiom surprizos lin trovi kiu mi estas! Sed mi portu al li liajn ventumilon kaj gantojn—se mi povos trovi ilin.” Dirante tion, ŝi atingis belaspektan dometon, sur kies pordo estis brila latuna ŝildo sur kiu la nomo “B. KUNIKLO” estis gravurita. Ŝi eniris sen frapi atentige, kaj rapidis al la supra etaĝo, plena de timo ke ŝi renkontos la realan Mari-Annon kaj forsendiĝos el la

domo antaŭ ol trovi la ventumilon kaj gantojn.

“Estas tre strange,” Alico diris al si, “plenumi taskojn por kuniklo! Mi supozas ke Dina donos al mi taskojn baldaŭ!” Kaj ŝi komencis imagi kiaj eventoj okazus: “‘Fraŭlino Alico! Venu ĉi tien tuj kaj pretiĝu por via promeno!’ ‘Mi venos post minuto, Vartistino! Sed mi devas gardi ĉi tiun mustruon ĝis revenos Dina, kaj certigi ke la muso ne eskapos.’ Sed mi kredas,” Alico pludiris, “ke ili ne permesus ke Dina restu en la domo se ĝi komencus ordoni al homoj tiel!”

Ŝi jam trovis plaĉan malgrandan ĉambron en kiu estis tablo ĉe la fenestro, kaj sur ĝi (konforme al ŝia espero) estis ventumilo kaj du aŭ tri paroj da malgrandaj blankaj kapridhaŭtaj gantoj: ŝi prenis la ventumilon kaj paron da gantoj, kaj estis tuj elironta el la ĉambro, kiam ŝia vido trafis malgrandan botelon starantan apud la spegulo. Neniu

etiketo ekzistis ĉifoje kun la vortoj “TRINKU MIN”, tamen ŝi eltiris la korkon kaj metis ĝin al siaj lipoj. “Mi scias ke *io* interesa nepre okazas,” ŝi diris al si, “kiam ajn mi manĝas aŭ trinkas; do mi trovos kion faros ĉi botelo. Mi esperas ke ĝi regrandigos min, ĉar vere mi tre enuas estante tiom eta malgrandulo!”

Tio ja okazis, kaj multe pli frue ol ŝi atendis: antaŭ ol ŝi trinkis duonon de la botelo, ŝi trovis sian kapon premanta la planfonon, kaj devis kliniĝi por ke ŝia kolo ne rompiĝu. Ŝi rapide formetis la botelon, dirante al si, “Tio tute sufiĉas—mi esperas ne plu kreski—Mi jam ne povas eliri tra la pordo—Kial mi trinkis tiom!”

Ve! Estis tro malfrue! Ŝi plu kreskis kaj kreskadis, kaj tre baldaŭ ŝi devis surgenuiĝi sur la planko: post plia minuto la spaco eĉ ne sufiĉis por tio, kaj ŝi provis la efikon de kuŝado kun unu kubuto kontraŭ la pordo, kaj la alia brako kurbigita



sub ŝia kapo. Tamen ŝi ankoraŭ kreskadis, kaj, kiel lastan penon, ŝi metis unu brakon tra la fenestron kaj unu piedon en la kamentubon, kaj diris al si, “Nun mi nenion pli povas, negrave kio okazos. *Kio* okazos al mi?”

Bonfortune por Alico, la malgranda magia botelo nun plene efikis, kaj ŝi ne pli kreskis: tamen estis tre malkomforte, kaj, ĉar ŝajne neniam estos oportuno por

ke ŝi denove eliru la ĉambron, ne mirigas ke ŝi estis malfeliĉa.

“Estis multe pli agrable ĉeĥejme,” pensis kompatinda Alico, “kie oni ne ĉiam pligrandiĝis kaj ŝrumpis, kaj ricevadis ordonojn de musoj kaj kunikloj. Mi preskaŭ preferus ne esti enirinta tiun kuniklotruon—tamen—tamen—ĉi tia vivo estas iom kurioza, sciu! Mi vere ne komprenas *kio* okazas al mi! Iam mi amis legi ferakontojn, kaj mi supozis ke tiaj aferoj neniam okazas, kaj nun jen mi en la centro de ferakonto! Oni devus verki libron pri mi, jes oni devus! Kaj kiam mi plenkreskos, mi verkos ĝin—sed mi jam plene kreskis,” ŝi pludiris mornavoĉe, “almenaŭ ne estas spaco por pli plene kreski *ĉi tie*.”

“Sed,” pensis Alico, “ĉu mi *neniam* fariĝos pli aĝa ol nun? Tio komfortigos, unumaniere—neniam fariĝi olda virino—sed—ĉiam devi lerni lecionojn! Ho, mi ne ŝatus *tion*!”

“Ho, malsaĝa Alico!” ŝi respondis al

si. “Kiel vi povus lerni lecionojn ĉi tie? Nu, estas apenaŭ spaco por vi, kaj tute nenia spaco por lernolibroj!”

Kaj tiel ŝi daŭrigis, unue rolante kiel unu persono kaj poste kiel alia, kaj farante enfine grandan konversacion, sed post pluraj minutoj ŝi aŭdis voĉon eleksteran, kaj atente aŭskultis.

“Mari-Ann! Mari-Ann!” diris la voĉo, “alportu miajn gantojn jam nun!” Sekvis nelaŭta paŝado sur la ŝtupoj. Alico sciis ke la Kuniklo venas serĉi ŝin, kaj ŝi tremis ĝis ŝi tremigis la domon, tute forgesante ke ŝi estas eble miloble pli granda ol la Kuniklo, kaj tute ne bezonas timi ĝin.

Baldaŭ la Kuniklo venis al la pordo, kaj klopodis malfermi ĝin; sed, ĉar la pordo devis malfermiĝi enen, kaj la kubuto de Alico forte premis ĝin, tiu klopodo fiaskis. Alico aŭdis ĝin diri al si, “Do mi ĉirkaŭiros kaj eniros per la fenestro.”

“*Tion* vi ne faros!” pensis Alico, kaj, atendinte ĝis ŝi aŭdis la Kuniklon tuj sub la fenestro, ŝi disetendis siajn fingrojn kaj faris kaptogeston en la aero. Ŝi nenion kaptis, sed ŝi aŭdis krieton kaj falon, kaj rompiĝon de vitro, kaj konkludis ke eblete ĝi falis en kukum-forcejon aŭ ion similan.



Sekvis kolera voĉo—de la Kuniklo—“Patriĉjo! Patriĉjo! Kie vi estas?” Kaj post tio voĉo kiun ŝi antaŭe ne aŭdis, “Certe jen mi estas! Elfosante pomojn, via moŝto!”

“Elfosante pomojn, ĉu?” diris la Kuniklo kolere. “Ĉi tien! Venu helpi min el ĉi tio!” (Pliaj sonoj de rompiĝanta vitro.)

“Nu diru al mi Patriĉjo, kio estas en tiu fenestro?”

“Certe, ĝi estas brako, via moŝto!” (Li prononcis ĝin “barako”.)

“Brako, ansero! Kiu vidis brakon tiom grandan? Nu, ĝi plenigas la tutan fenestron!”

“Certe ja, via moŝto: tamen brako malgraŭe.”

“Nu, ĝi ne rajtas esti tie: forprenu ĝin!”

Tion sekvis longa silento, kaj Alico aŭdis nur sporadajn flustrojn; kiaj “Certe, al mi ne plaĉas, via moŝto, tute ne, neniel!” “Faru kion mi ordonas, timulo!” kaj fine ŝi denove disetendis siajn fingrojn kaj kapte gestis en la aero. Ĉifoje aŭdiĝis *du* krietoj, kaj pli sonis rompiĝanta vitro. “Kiom da kukumforcejoj estas!” pensis Alico. “Kion ili faros poste? Kaj tiri min el la fenestro, nu mi volegas ke ili ja *povu*. Certe *mi* ne volas resti ĉi tie pli longe!”

Ŝi atendis dum kelka tempo sen aŭdi ion pli: fine venis la bruo de malgrandaj ĉarumradoj, kaj la sono de de multaj voĉoj samtempe parolantaj: ŝi deĉifris la vortojn: “Kie ’stas l’ alia ŝtupareto?—Nu, mi ne devis alporti krom unu; Vilĉjo havas l’ alian—Vilĉjo! Alportu ĝin, knabo!—Jen, starigu ĉe tiu angulo—Ne, unue kunligu—ili ankoraŭ ne atingas eĉ la duonan alton—Ho! nu, ili sufiĉos; ne tro postulu—Jen, Vilĉjo! Kaptu ĉi tiun ŝnuron—Ĉu la tegmento toleros?—Atentu! Nefiksita ardezo!—Ho, ĝi falas! Fortiru la kapojn!” (laŭta bruo)—“Nu, kiu faris tion?—Vilĉjo, mi kredas—Kiu subiru tra la kameno?—Ne, *mi* ne! *Vi*!—*Tion* mi ne faros!—Vilĉjo subiru—Jen, Vilĉjo! La mastro diras ke vi subiru en la kameno!”

“Ho! Do Vilĉjo devas subiri en la kameno, ĉu?” diris Alico al si. “Ŝajnas ke ili donas ĉiujn taskojn al Vilĉjo! Nepre mi ne volonte estus en la pozicio de Vilĉjo: ĉi tiu kameno



estas mallarĝa, certe; sed mi *kredas* povi iomete piedbati!”

Ŝi retiris sian piedojn laŭeble plej, kaj atendis ĝis ŝi aŭdis malgrandan beston (ŝi ne povis diveni kiaspeca ĝi estas) grati kaj moviĝi en la kameno ne multe super ŝi: tiam, dirante al si, “Tiu estas Vilĉjo,” ŝi faris unu akran piedbaton, kaj atendis por vidi kio sekve okazos.

Unue ŝi aŭdis ĝeneralan ĥoron de “Tien iras Vilĉjo!” kaj poste nur la voĉon de la Kuniklo—“Kaptu

lin, vi apud la heĝo!” sekvis silento, kaj post tio nova konfuza bruo de voĉoj—“Subtenu lian kapon—Nun brandon—Ne senspirigu lin—Kiel estis, oldulo? Kio okazis al vi? Diru al ni ĉion!”

Lasta estis malgranda febla grinca voĉo, (“De Vilĉjo,” pensis Alico), “Nu, mi apenaŭ scias—Ne pli, dankon; mi fartas pli bone nun—sed mi ne povas diri, mi estas tro konfuzita—mi nur scias ke io venas al mi kiel saltpupo kaj supren mi iras kvazaŭ ĉiel-raketo!”

“Tion vi faris, oldulo!” diris la aliaj.

“Ni bruligu la domon!” diris la voĉo de la Kuniklo, kaj Alico kriis kiel eble plej laŭte, “Se vi faros tion, mi sendos Dinan kontraŭ vin!”

Tuj okazis plena silento, kaj Alico pensis al si, “Kion ili tamen ja faros? Se ili estus saĝaj, ili forprenus la tegmenton.” Post unu aŭ du minutoj ili rekomencis moviĝadi, kaj Alico aŭdis la Kuniklon diri,

“Unu ĉarumo da ili sufiĉos, komence.”

“Ĉarumo da *kio*?” pensis Alico; sed ŝi ne bezonis longe dubi, ĉar la sekvan minuton pluvo da malgrandaj ŝtoneroj envenis brue tra la fenestron, kaj kelkaj trafis ŝian vizaĝon. “Mi ĉesigos tion,” ŝi diris al si kaj kriis, “Ne ripetu tion!” kio estigis novan plenan silenton.

Alico rimarkis, iom surprizate, ke la ŝtoneroj ŝanĝiĝas en kuketojn dum ili kuŝas sur la planko, kaj lerta ideo eniris ŝian kapon. “Se mi manĝos kuketon,” ŝi pensis, “certe ĝi iel ŝanĝos mian grandecon; kaj, ĉar ĝi certe ne povos pli grandigi min, sendube ĝi malpligrandigos min, mi supozas.”

Do ŝi glutis kuketon, kaj ĝojigis ŝin la trovo ke ŝi komencis tuj ŝrumpi. Kiam ŝi estis sufiĉe malgranda por trairi la pordon, ŝi kuris el la domo, kaj trovis tutan aron da bestetoj kaj birdoj atendantaj ekstere. La kompatinda malgranda lacerto Vilĉjo estis en la mezo, apogate de du

kobajoj, kiuj trinkigis ion per botelo. Ili ĉiuj ekkuris cele Alicon tuj kiam ŝi aperis; sed ŝi forkuris laŭeble plej forte, kaj baldaŭ trovis sin sekura en densa arbaro.

“Unue,” diris Alico al si, dum ŝi vagadis en la arbaro, “necesas rekreski al mia ĝusta grandeco; kaj due mi sukcesu eniri tiun belan ĝardenon. Mi opinias ke tiu estas la plej bona plano.”

Ĝi sonis tre bona plano, sendube, kaj tre bele kaj simple aranĝita; la sola problemo estis ke ŝi tute ne sciis kiel plenumi ĝin; kaj dum ŝi rigardis malcerte inter la arboj, akra bojeto tuj super ŝia kapo devigis ŝin suprenrigardi rapide.

Enorma hundido rigardadis ŝin per grandaj rondaj okuloj, kaj feble etendis piedon, klopodante tuŝi ŝin. “Kompatinduleto!” diris Alico, kaĵoltone, kaj ŝi penis faĵfi al ĝi; sed ŝi multe timis pro la penso ke eble ĝi estas malsata, kaj se tiel do ĝi verŝajne plenmanĝos ŝin malgraŭ ŝia kaĵolado.

LA KUNIKLO ENSENDAS MALGRANDAN VILĈJON



Apenaŭ sciante kion ŝi faras, ŝi prenis tre etan bastonon, kaj tenis ĝin antaŭ la hundido; sekve la hundido eksaltis en la aeron kun ĉiuj piedoj samtempe en la

aero, bojetante feliĉe, kaj kuris cele la bastoneton kaj ludis ataki ĝin; Alico kuris malantaŭ grandan kardon, por ke la hundo ne surtretu ŝin; kaj tuj kiam ŝi aperis aliflanke, la hundido denove kuris cele la bastoneton, kaj falis kapsuben pro sia fervoro kapti ĝin: tiam Alico, kredante ke estas simile al ludado kun ĉarĉevalo, kaj atendente ĉiumomente esti surtretata, denove kuris ĉirkaŭ la kardon; tiam la hundido komencis serion de malgrandaj kuroj cele la bastoneton, kurante iomete antaŭen ĉiufoje kaj multe malantaŭen, kaj bojante raŭke tutdume, ĝis fine ŝi sidiĝis tre for, anhelante, kun sia lango pendanta el la buŝo kaj la grandaj okuloj duone fermitaj.

Ŝajnis al Alico esti bona oportuno eskapi, do ŝi tuj komencis, kaj ŝi kuris ĝis ŝi estis tre laca kaj senspira, kaj ĝis la bojado de la hundido sonis tre fadinta pro la distanco.

“Tamen ĝi estis tre kara hundido!” diris Alico, dum ŝi apogis sin per ranunkolo por iomete ripozi, kaj ventumis sin per folio. “Mi multe ŝatus instrui al ĝi ludojn, se—se mi nur estus ĝuste granda por tio! Ve! Mi preskaŭ forgesis ke mi devos rekreski! Mi pensu—*kiel* fari tion? Mi supozas ke mi manĝu aŭ trinku ion; sed la granda demando estas, kion?”

La granda demando certe estis, kion? Alico ĉirkaŭrigardis la florojn kaj la herbofoliojn, sed ŝi vidis nenion kio aspektas ĝusta manĝaĵo aŭ trinkaĵo por la situacio. Kreskis granda agariko proksime al ŝi, preskaŭ same alta kiel ŝi; kaj, rigardinte sub ĝi, kaj ambaŭflanke de ĝi, kaj malantaŭ ĝi, ŝi ekpensis ke estos bone serĉi por trovi kio estas sur ĝi.

Ŝi etendis sin starante piedpinte, kaj rigardis trans la randon de la agariko, kaj ŝiaj okuloj tuj renkontis tiujn de granda blua raŭpo, kiu sidis sur la supro,

kun siaj brakoj krucitaj, trankvile fumante
longan nargileon, kaj tute ne atentante ŝin
nek ion alian.



ĈAPITRO V

KONSILO DE RAŬPO

LA Raŭpo kaj Alico rigardis unu la alian dum kelka tempo silente: fine la Raŭpo prenis la nargileon el sia buŝo, kaj parolis al ŝi per malvigla, dormema voĉo.

“Kiu estas *vi?*” diris la Raŭpo.

Tio ne estis kuraĝiga komenco por konversacio. Alico respondis, iom timide, “Mi—mi apenaŭ scias, Sinjoro, ĝuste nun—almenaŭ mi scias kiu mi estis kiam mi ellitiĝis hodiaŭ matene, sed mi kredas ke mi ŝanĝiĝis plurfoje post tiam.”

“Kion signifas tio?” diris la Raŭpo severe. “Komprenigu vin!”

“Mi ne povas komprenigi *min*, Sinjoro,” diris Alico, “ĉar mi ne estas mi, komprenu.”

“Mi ne komprenas,” diris la Raŭpo.

“Nu, mi ne povas pli klare esprimi,” Alico respondis tre ĝentile, “ĉar mi ne povas mem kompreni; kaj estas tre konfuze ŝanĝi grandecon plurfoje dum unu tago.”

“Tute ne konfuze,” diris la Raŭpo.

“Nu, eble vi ankoraŭ ne spertis tion,” diris Alico; “sed kiam vi devos fariĝi krizalido—tio okazos, iam, sciu—kaj poste fariĝi papilio, mi kredas ke ankaŭ vi havos

iom konfuzan senton, ĉu ne?”

“Neniel,” diris la Raŭpo.

“Nu, eble viaj sentoj malsimilas,” diris Alico; “mi scias nur ke *mi* multe konfuziĝus.”

“Vi!” diris la Raŭpo senrespekte. “Kiu estas *vi*?”

Tio revenigis ilin al la komenco de la konversacio. Alico iom iritis la *tre* mallongaj komentoj de la Raŭpo, kaj ŝi etendis sin kaj diris, tre serioze, “Mi opinias ke vi devus diri al mi kiu *vi* estas, unue.”

“Kial?” diris la Raŭpo.

Jen nova konfuza demando; kaj, ĉar Alico ne povis elpensi bonan kialon, kaj la Raŭpo ŝajne estis *tre* malbonhumora, ŝi forturnis sin.

“Revenu!” la Raŭpo vokis al ŝi. “Mi volas diri ion gravan!”

Certe tio sonis promesoplena. Alico turnis sin kaj revenis.

“Ne koleru,” diris la Raŭpo.

“Ĉu jen ĉio?” diris Alico, englutante laŭeble sian koleron.

“Ne,” diris la Raŭpo.

Alico decidis ke eble estas dezirinde atendi, ĉar nenio alia estas farenda, kaj eble ĝi fine diros al ŝi ion aŭskultindan. Dum pluraj minutoj ĝi fumadis sen paroli; sed fine ĝi malkrucis siajn brakojn, reprenis la nargileon el sia buŝo, kaj diris, “Do vi opinias ke vi ŝanĝiĝis, ĉu?”

“Mi kredas ke jes, Sinjoro,” diris Alico. “Mi ne memoras kiel antaŭe—kaj mi ne restas samgranda dum eĉ dek minutoj!”

“Ne memoras *kion?*” diris la Raŭpo.

“Nu, mi provis diri ‘*Ĉar jen l’ abelo laborema*’, sed ĝi fariĝis tute diferenca!” Alico respondis per tre melankolia voĉo.

“Deklamu ‘*Vi estas maljuna, Patro Vilhelm*’,” diris la Raŭpo.

Alico kunmetis siajn manojn, kaj komencis:—



*“Vi estas maljuna, ho Patro Vilhelmo,
 Kaj via hararo nun estas tre blanka.
 Sed vi staras sur l’ kalva kapo sen helmo—
 Ĉu estas enkape io nun manka?”*

*“Junece,” la patro diris al l’ filo,
 “Mi kredis ke tio damaĝus la cerbon.
 Nun maljuna mi scias ke mankas pensilo,
 Do mi staras surkape kaj manĝas la herbon.”*



*“Vi estas maljuna, mi diris ĝin jame,
Kaj tro da manĝaĵoj nun faris vin dika.
Sed vi saltas transkapen tra l’ pordon tutsame
kiel dumjune; ĉu vere vi trovas ĝin ŝika.”*

*“Junece,” l’ aĝulo deklaris, “kun ĝuo
per ŝmiraĵo malkara l’ artikojn flekseblaj
mi tenis; nur pagu ŝilingon por duo
da ujoj, por uzi sur viaj tre feblaj.”*



*“Vi estas maljuna, l’ makzeloj malfortas
 Por ion tramordi pli duran ol graso;
 Sed vi manĝas anseron, eĉ bekon ĝi portas,
 Vi kiel sukcesas do maĉi la mason?”*

*“Junece,” la patro respondis al l’ knabo,
 “Kun l’ edzino pri juro mi longe disputis;
 La sekvan muskolan kapablon aĝrabo
 Ne povis forpreni, l’ anseron atutis.”*



*“Vi estas maljuna, sed en tiu fazo
 Per okuloj jam feblaj vi spite maljunon
 Lerte ĵonglas angilon surpinte de l’ nazo—
 Vi kiel novaĵon ĉi metis sub sunon?”*

*“Mi respondis trifoje, kaj tio sufiĉas,”
 Al li diris la patro, “vi tro arogante
 Ŝajne kredas: malŝpari la tempon mi riĉas!
 Piedbaton ricevos do vi elegante!”*

“Vi erare deklamis tion,” diris la Raŭpo.

“Ne *tute* ĝuste, mi agnoskas,” diris Alico timide; “kelkaj vortoj iomete ŝanĝiĝis.”

“Vi fuŝis ĝin de la komenco ĝis la fino,” diris la Raŭpo firme, kaj daŭris silento dum pluraj minutoj.

La Raŭpo la unua parolis.

“Kiom granda vi volas esti?” ĝi demandis.

“Nu, ne gravas vere la grandeco,” Alico rapide respondis; “sed ne plaĉas tiom ofte ŝanĝiĝi, sciu.”

“Mi *ne* scias,” diris la Raŭpo.

Alico diris nenion: neniam antaŭe iu tiom kontraŭdiris ŝin, kaj ŝi sentis ke tre baldaŭ ŝi koleriĝos.

“Ĉu vi estas kontenta nun?” demandis la Raŭpo.

“Nu, mi preferus esti *iomete* pli granda, Sinjoro, se ne ĝenus vin,” diris Alico: “ok centimetroj estas aĉa grandeco.”

“Ĝi estas vere tre bona grandeco!” diris la Raŭpo kolere, etendante sin supren dum

ĝi parolis (ĝi estis precize ok centimetrojn longa).

“Sed mi ne kutimas al ĝi!” pledis povra Alico per kompatiga tono. Kaj ŝi pensis, “Se nur la bestoj ne tiom facile ofendiĝus!”

“Vi kutimiĝos dum la forpaso de tempo,” diris la Raŭpo; kaj ĝi metis la nargileon en sian buŝon kaj rekomencis fumi.

Ĉifoje Alico atendis pacience ĝis ĝi decidis denove paroli. Post unu aŭ du minutoj la Raŭpo prenis la nargileon el sia buŝo, kaj oscedis unu-du-foje, kaj skuis sin. Poste ĝi subeniris de la agariko, kaj forrampis en la herbon, nur komentante, dum ĝi iris, “Unu flanko altigos vin, kaj la alia flanko malaltigos vin.”

“Unu flanko de *kio*? La alia flanko de *kio*?” pensis Alico.

“De la agariko,” diris la Raŭpo, kvazaŭ ŝi parolis pervoĉe; kaj post nur momento ĝi estis ekster ŝia vidpovo.

Alico restis kontemplantante la agarikon dum

minuto, penante distingi kiuĵ estas ĝiaĵ du flankoj; kaj, ĉar ĝi estis precize ronda, ŝi trovis tion tre malfacila demando. Tamen, fine, ŝi etendis siajn brakojn ĉirkaŭ ĝin laŭeble, kaj derompis eron de la rando per ĉiu mano.

“Kaj nun, kiu estas kiu?” ŝi diris al si, kaj ŝi manĝetis malgrandan eron de la dekstra parto por provi la efikon: la sekvan momenton ŝi sentis grandegan baton al la malsupro de sia mentono: ĝi frapis ŝian piedon!

Ŝin multe timigis tiu tre subita ŝanĝo, sed ŝi havis senton ke necesas perdi tute neniom da tempo, ĉar ŝi ŝrumpas rapide: do ŝi tuj ekkomencis manĝi eron el la alia peco. Ŝia mentono tiom forte premis ŝian piedon, ke apenaŭ estis sufiĉe da spaco por malfermi la buŝon; sed ŝi fine sukcesis, kaj sukcesis gluti ereton de la maldekstra peco.

*	*	*	*
	*	*	*
*	*	*	*

“Jen, mia kapo finfine estas libera!” diris Alico per ĝoja tonoj, kiu fariĝis alarmtono post plia momento, kiam ŝi trovis ke ŝiaj ŝultroj tute ne estas troveblaj: kiam ŝi malsupren rigardis ŝi povis vidi nur enorme longan kolon, kiu ŝajnis leviĝi kiel trunko el maro de verdaj folioj kuŝantaj multe sube.

“Kio *povas* esti tiu verdaĵo?” diris Alico. “Kaj *kien* iris miaj ŝultroj? Kaj ho, miaj kompatindaj manoj, kial mi ne povas vidi vin?” Ŝi movadis ilin dum ŝi parolis, sed sekvis ŝajne neniu rezulto, escepte de iometa skuado de la foraj verdaj folioj.

Ĉar ŝajne estis neeble levi ŝiajn manojn al ŝia kapo, ŝi provis movi sian kapon malsupren al ili, kaj ĝoje trovis ke ŝia kolo estas fleksebla facile ĉiudirekte, kvazaŭ serpento. Ŝi ĵus sukcesis kurbigi ĝin laŭ gracia zigzago, kaj estis preta plonĝi inter la foliojn, kiujn ŝi trovis esti nur la suproj de la arboj sub kiuj ŝi vagis, kiam akra

siblado devigis ŝin rapide retiri sin: granda kolombo flugis sur ŝian vizaĝon, kaj batis ŝin feroce per siajflugiloj.

“Serpento!” kriegis la Kolombo.

“Mi *ne* estas serpento!” diris Alico indigne. “Lasu min!”

“Serpento, mi ripetas!” denove diris la Kolombo, sed per malpli fera tonaĵo, kaj ĝi aldonis, kun ia ploreto, “mi provis ĉion, sed ŝajne nenio sufiĉas por ili!”

“Mi tute ne komprenas pri kio vi parolas,” diris Alico.

“Mi provis la radikojn de arboj, kaj mi provis bordojn, kaj mi provis heĝojn,” la Kolombo pludiris, sen atenti ŝin; “sed la serpentoj! Nenio kontentigas ilin!”

Por Alico estis pli kaj pli enigme, sed ŝi opiniis ke ne utilis denove paroli antaŭ ol la Kolombo finos.

“Kvazaŭ ne estus sufiĉe malfacile elkovi la ovojn,” diris la Kolombo, “sed mi devas atenti pri serpentoj nokte kaj tage! Mi eĉ

ne unu dormeton spertas de tri semajnoj!”

“Mi tre bedaŭras ke vi maltrankviliĝis,” diris Alico, kiu komencis kompreni ĝin.

“Kaj mi ĵus okupis la plej altan arbon en la arbaro,” pludiris la Kolombo, fortigante sian voĉon ĝis ĝi fariĝis ŝriko, “kaj mi ĵus komencis kredi ke mi fine estas libera de ili, sed ili neeviteble rampas el la ĉielo! Uĥ! Serpento!”

“Sed mi *ne* estas serpento, mi diras!” diris Alico. “Mi estas—mi estas—”

“Nu! *Kio* vi estas?” diris la Kolombo. “Mi vidas ke vi provas elpensi ion!”

“Mi—mi estas malgranda knabino,” diris Alico, iom dube dum ŝi memoris kiom da ŝanĝoj ŝi spertis tiutage.

“Tute verŝajne!” diris la Kolombo per tono de plej profunda malestimo. “Mi jam vidis multajn malgrandajn knabinojn, sed neniam eĉ *unu* kun kolo tia! Ne, ne! Vi estas serpento; ne utilas nei tion. Mi supozas ke vi diros al mi nun ke neniam

vi gustumis ovon!”

“Mi ja gustumis ovojn, certe,” diris Alico, kiu estis tre verema infano; “sed malgrandaj knabinoj manĝas ovojn samkiel serpentoj, komprenu.”

“Mi ne kredas tion,” diris la Kolombo; “sed se estas vere, do ili estas nur specio de serpentoj, nur tion mi diras.”

Tiu estis tute nova ideo por Alico, kaj ŝi silentis dum unu aŭ du minutoj, kaj tio donis al la Kolombo oportunon pludiri, “Vi serĉas ovojn, mi tute bone scias *tion*; kaj kial gravas al mi ĉu vi estas malgranda knabino aŭ serpento?”

“Multe gravas al *mi*,” diris Alico rapide; “sed mi ne serĉas ovojn, hazarde; kaj se mi ja serĉus ilin, mi ne volus *viajn*: al mi ne plaĉas nekuiritaj.”

“Nu, foriru do!” diris la Kolombo per paŭta tono, dum ĝi rekomfortigis sin en sia nesto. Alico kaŭriĝis inter la arboj laŭeble, ĉar ŝia kolo plurfoje implikiĝis

inter la branĉoj, kaj fojfoje ŝi devis halti kaj liberigi ĝin. Post kelka tempo ŝi memoris ke ŝi plu tenas la agarikerojn en la manoj, kaj tre zorge ŝi mordetis, unue unu pecon kaj poste la alian, kelkfoje altiĝante kaj kelkfoje malaltiĝante, ĝis ŝi sukcesis reatingi sian normalan alton.

Jam de longe ŝi ne estis eĉ proksimume ĝuste granda, kaj unue la sento estis tre stranga, sed ŝi kutimiĝis post kelkaj minutoj, kaj komencis paroli al si, kiel kutime, “Nu, jen duono de mia plano sukcesis! Kiom konfuzas tiom da ŝanĝiĝoj! Mi neniam certas kia mi estos, de unu minuto ĝis alia! Tamen, mi reakiris mian ĝustan altecon: la sekva tasko estas eniri tiun belan ĝardenon—*kiel* fari tion?” Dum ŝi diris tion, ŝi subite trovis liberan spacon, en kiu estis malgranda domo iom pli ol metron alta. “Negrave kiu loĝas tie,” pensis Alico, “tute ne taŭgus renkonti ilin ĉi-dimensia: nu, ili tute freneziĝus pro timo!”

Do ŝi rekomencis mordeti la dekstran eron,
kaj ŝi ne kuraĝis proksimiĝi al la domo
antaŭ ol malaltigi sin al dudek tri centimetroj.

ĈAPITRO VI

PORKO KAJ PIPRO

DUM unu aŭ du minutoj ŝi staris rigardante la domon, kaj demandante al si kion fari nun, kiam subite lakeo ekkuris el la arbaro—(ŝi supozis lin lakeo ĉar li estis en livreo: alie, se ŝi juĝus nur per lia vizaĝo, ŝi nomus lin fiŝo)—kaj frapis laŭte sur la pordon per siaj pugnoj. Ĝin malfermis alia lakeo en livreo, kun ronda vizaĝo kaj grandaj okuloj kvazaŭ rano; kaj ambaŭ lakeoj, rimarkis Alico, havis pudritan hararon kiu bukle kovris la kapon. Ŝi tre scivolemis pri kio temas, kaj ŝi rampis iom el la arbaro por aŭskulti.



La Fiŝlakeo komencis prenante el sub sia brako grandan leteron, preskaŭ egale grandan kiel li mem, kaj tion li transdonis al la alia, dirante, per solena tono, “Por la Dukino. Invito ludi kroketon, de la

Reĝino.” La Ranlakeo ripetis, per la sama solena tono, nur iomete ŝanĝante la vortordon, “De la Reĝino. Invito ludi kroketon, por la Dukino.”

Post tio ambaŭ profunde klinis sin, kaj iliaj bukloj kunimplikiĝis.

Alico tiom ridis pro tio ke ŝi devis rekuri en la arbaron timante ke ili aŭdos ŝin; kaj, kiam ŝi poste elrigardetis, la Fiŝlakeo estis for, kaj la alia sidis sur la tero proksime al la pordo, rigardante stulte la ĉielon.

Alico timide marŝis al la pordo kaj frapis.

“Neniel utilas frapi,” diris la Lakeo, “kaj tio pro du kialoj. Unue, ĉar mi estas samflanke de la pordo kiel vi; due, ĉar oni tiom bruas en la domo ke tute neniu povus aŭdi vin.” Kaj certe ja estis eksterordinara bruego en la domo—konstanta kriado kaj ternado, kaj fojfoje granda kraŝ!, kvazaŭ telero aŭ poto

disrompiĝas.

“Bonvolu diri, do,” diris Alico, “kiel mi eniros?”

“Eble havus sencon via frapado,” la Lakeo daŭrigis, sen atenti ŝin, “se la pordo estus inter ni. Ekzemple, se vi estus *en* la domo, vi povus frapi, kaj mi povus ellasi vin, komprenu.” Li suprenrigardis en la ĉielon senpaŭze dum li parolis, kaj tion Alico opiniis tute maldeca. “Sed eble li ne kulpas,” ŝi diris al si; “liaj okuloj estas *tre* proksimaj al la supro de lia kapo. Sed ĉiuokaze li devus respondi demandojn.—Kiel mi eniros?” ŝi ripetis, laŭte.

“Mi sidos ĉi tie,” la Lakeo komentis, “ĝis morgaŭ—”

Tiumomente la pordo de la domo malfermiĝis, kaj granda telero elflugis, rekte celante la kapon de la Lakeo: ĝi preskaŭ trafis lian nazon, kaj rompiĝis frapante arbon malantaŭ li.

“—aŭ la posta tago, eble,” la Lakeo daŭrigis per la sama tono, precize kvazaŭ nenio okazis.

“Kiel mi eniros?” demandis Alico denove, pli laŭte.

“*Ĉu* vi ja eniros?” diris la Lakeo. “Jen la unua demando, komprenu.”

Sendube: sed al Alico ne plaĉis la informo. “Estas vere aĉe,” ŝi murmuris al si, “kiel la bestoj ĉiuj disputas. Sufiĉe por frenezigi onin!”

La Lakeo ŝajne opiniis ke jen bona oportuno ripeti sian komenton, laŭ varia formo. “Mi sidos ĉi tie,” li diris, “sporade, dum tagoj kaj pli da tagoj”.

“Sed kion *mi* faru?” diris Alico.

“Kion ajn vi volas,” diris la Lakeo, kaj li komencis fajfi.

“Ho, ne utilas paroli al li,” diris Alico senespere: “li estas tute idiota!” Kaj ŝi malfermis la pordon kaj eniris.

La pordo kondukis rekte en grandan



kuirejon, kiu estis plena de fumo de unu fino ĝis la alia: la Dukino sidis sur trikrura tabureto en la mezo, vartante bebon; la kuiristino estis klinita super la fajron, kirlante grandan kaldronon kiu aspektis plena de supo.

“Certe estas tro da pipro en tiu supo!”
Alico diris al si, laŭeble, dum ŝi ternadis.

Certe estis tro da ĝi en la aero. Eĉ la Dukino kelkfoje ternis; kaj la bebo, nu ĝi ternis kaj kriegis alterne sen paŭzi dum eĉ momento. Nur du uloj en la kuirejo ne ternis, ili estis la kuiristino, kaj granda kato, kiu kuŝis apud la kameno kaj ridetis de unu orelo ĝis la alia.

“Bonvolu diri al mi,” diris Alico, iom timide, ĉar ŝi ne estis tute certa ĉu estas dece ke ŝi parolas la unua, “kial via kato ridetas tiel?”

“Ĝi estas el Ĉeŝiro,” diris la Dukino, “jen la kialo. Porkaĉo!”

Ŝi diris tiun lastan vorton tiom subite kaj forte ke Alico eksaltis; sed post momento ŝi rimarkis ke ĝi celis la bebon kaj ne ŝin, do ŝi kuraĝiĝis kaj plu diris:—

“Mi ne sciis ke Ĉeŝiraj katoj ĉiam ridetas; efektive, mi ne sciis ke katoj *povas* rideti.”

“Ĉiuj povas,” diris la Dukino; “kaj la plejmulto ja faras.”

“Mi ne scias pri kato kiu ridetas,” Alico diris tre ĝentile, tre plaĉate ĉar ŝi komencis konversacion.

“Vi ne scias multon,” diris la Dukino; “kaj tio estas fakto.”

Al Alico tute ne plaĉis la tono de tiu komento, kaj ŝi opiniis ke estus bone instigi alian temon por la konversacio. Dum ŝi penis elpensi temon, la kuiristino deprenis la supkaldronon de la fajro, kaj tuj komencis ĵeti ĉion atingeblan cele la Dukinon kaj la bebon—unue la fajrostangojn; sekvis pluvo de kuirpotoj, teleroj kaj pladoj. La Dukino tute ne atentis ilin, eĉ kiam ili trafis ŝin; kaj la bebo jam kriadis tiom forte ke estis tute neeble konstati ĉu aŭ ne la frapoj vundis ĝin.

“Ho, *bonvolu* atenti kion vi faras!” kriis Alico, supren kaj malsupren saltante pro timagonio. “Ho, ĝi trafis lian *karegan* nazon!” kiam nekutime granda kuirpoto tre

proksimen flugis al ĝi, kaj preskaŭ forportis ĝin.

“Se ĉiu atentus siajn proprajn aferojn,” la Dukino diris, per raŭka grumblo, “la mondo ĉirkaŭirus multe pli rapide ol nun.”

“Kaj tio tute *ne* estus advantaĝo,” diris Alico, kiun tre plezurigis la oportuno montri iom da ŝia scio. “Nur pensu, kiom tio ĝenus la tagon kaj la nokton! La tero bezonas dudek kvar horojn por rotacii laŭ sia akso; se vi tenas tion en la kapo—”

“Rilate al kapoj,” diris la Dukino, “dehaku *ŝian* kapon!”

Alico rigardetis iom malkviete la kuiristinon, por vidi ĉu ŝi intencas plenumi la peton; sed la kuiristino okupis sin per supkirlado, kaj laŭaspekte ne aŭskultis, do ŝi pludiris: “Dudek kvar horojn, mi *kredas*; aŭ ĉu eble dek du? Mi—”

“Ho, ne demandu al *mi*,” diris la Dukino; “mi neniam povis toleri kalkulojn!” Kaj dirinte tion ŝi rekomencis varti sian

infanon, kantante ian lulkanton al ĝi, kaj forte skuante ĝin je la fino de ĉiu verso:—

*Pro krio hastu veni,
kaj batu ĝis li ĉitas:
Li ternas nur por ĝeni,
Li scias ke iritas.*

REFRENO

(En kiu kunkantis la kuiristino kaj la bebo):—

Aŭ! aŭ! aŭ!

Dum la Dukino kantis la duan strofon de la kanto, ŝi daŭre ĵetis la bebon fortege supren kaj malsupren, kaj la povruleto kriegis tiom ke Alico apenaŭ povis aŭdi la vortojn:—

*Pro kri' mi haste venas,
Kaj batas ĝis li ĉitas:
Li pipran ĝuon tenas
Do kiam ĝi invitas!*

REFRENO

Aŭ! aŭ! aŭ!

“Jen! Vi vartu ĝin iom, se vi deziras!” La Dukino diris al Alico, ĵetante la bebon al ŝi dum ŝi parolis. “Mi devas pretigi min por ludi kroketon kun la Reĝino,” kaj ŝi rapidis el la ĉambro. La kuiristino ĵetis paton cele ŝin dum ŝi eliris, sed ĝi nur preskaŭ trafis ŝin.

Alico malfacile kaptis la bebon, ĉar ĝi estis kuriozaforma uleto, kaj ĝi disetendis siajn brakojn kaj krurojn ĉiudirekten, “same kiel asterio,” pensis Alico. La povruleto ronkadis kiel vapormotoro kiam ŝi kaptis ĝin, kaj daŭre faldis sin kaj rektigis sin, tiel ke ensume, dum la unuaj unu-du minutoj, ŝi apenaŭ povis teni ĝin.

Tuj kiam ŝi elpensis taŭgan manieron varti ĝin (nome, tordi ĝin kvazaŭ nodon, kaj poste firme teni ĝiajn dekstran orelon kaj maldekstran piedon, por ke ĝi ne maltordu sin), ŝi elportis ĝin en la liberan aeron. “Se mi ne forprenos ĉi

tiun infanon kun mi,” pensis Alico, “ili nepre murdos ĝin dum la venontaj unu-du tagoj: ĉu ne signifus murdi ĝin, postlasi ĝin?” Ŝi diris la lastajn vortojn pervoĉe, kaj la uleto muĝetis responde (ĝi ne plu ternis, nun). “Ne muĝetu,” diris Alico; “tute ne decas esprimi vin tiel.”

La bebo denove muĝetis, kaj Alico tre malkviete rigardis ĝian vizaĝon por trovi kio estas al ĝi. Ne estis ebla dubo, ĝi ja havis *tre* suprenturnitan nazon, pli kiel de porko ol de homo; kaj ĝiaj okuloj ankaŭ fariĝis multe tro malgrandaj por bebo: ensume al Alico tute ne plaĉis ĝia aspekto. “Sed eble ĝi nur ploradis,” ŝi pensis, kaj ŝi rerigardis ĝiajn okulojn, por trovi ĉu estas larmoj.

Ne, ne estis larmoj. “Se vi fariĝos porko, kara,” diris Alico, serioze, “mi tute ne plu zorgos pri vi. Atentu!” La povruleto denove ploris (aŭ muĝetis, ne eblis distingi), kaj ili plu marŝis silente.

Alico ĵus komencis pensi, “Nu, kion mi faru pri ĉi tiu ulo, kiam mi reportos ĝin hejmen?” kiam ĝi denove muĝis, tiom forte



ke ŝi alarmite rigardis ĝian vizaĝon. Ĉifoje *ne* eblis erari: ĝi estis vera porko, nek pli nek malpli, kaj ŝi sentis ke estus tute absurde se ŝi plu portus ĝin.

Do ŝi metis la uleton sur la teron, kaj kun granda sento de liberiĝo ŝi rigardis ĝin rapide fortroti en la arbaron. “Se ĝi plenkreskus,” ŝi diris al si, “ĝi fariĝus ege malbela infano: sed ĝi estas iom bela porko, mi opinias.” Kaj ŝi komencis pripensi aliajn infanojn kiujn ŝi konis, kiuj povus esti tre bonaj porkoj, kaj ŝi ĝuste

komencis diri al si, “se oni nur scius kiel ĝuste ŝanĝi ilin—” sed tiam ŝin iomete alarmis vidi la Ĉeŝiran Katon sidanta sur branĉo de arbo kelkajn metrojn for.

La Kato nur ridetis vidante Alicon. Ĝi aspektis bonhumora, ŝi pensis: tamen ĝi ja havis *tre* longajn ungojn kaj multegajn dentojn, do ŝi sentis ke necesas respektoplene trakti ĝin.

“Ĉeŝira Kaĉjo,” ŝi komencis, iom timide, ĉar ŝi tute ne sciis ĉu al ĝi plaĉos tiu nomo: tamen, ĝi nur iom pli larĝe ridetis. “Nu, ĝi estas bonhumora ĝis nun,” pensis Alico, kaj ŝi pludiris, “Bonvolu diri al mi kiudirekten mi iru de ĉi tie?”

“Multe dependas de kien vi volas iri,” diris la Kato.

“Ne multe gravas kien—” diris Alico.

“Do ne gravas kiudirekten vi iros,” diris la Kato.

“—se nur mi iros *ien*,” Alico aldonis klarige.

“Ho, nepre vi faros tion,” diris la Kato, “se vi sufiĉe longe marŝos.”

Alico opiniis ke ne eblas nei tion, do ŝi provis alian demandon. “Kiaj homoj loĝas ĉi tie?”

“*Tiudirekte*,” la kato diris, gestante per sia dekstra piedo, “loĝas Ĉapelisto: kaj *tiudirekte*,” gestante per la alia piedo, “loĝas Marta Leporo. Vizitu kiun vi volas: ambaŭ frenezas.”

“Sed mi ne volas iri inter frenezulojn,” Alico komentis.

“Ho, estas neeviteble,” diris la Kato: “ni ĉiuj frenezas ĉi tie. Mi frenezas. Vi frenezas.”

“Kiel vi scias ke mi estas freneza?” diriis Alico.

“Vi devas esti,” diris la Kato, “se ne, vi ne venus ĉi tien.”

Alico tute ne opiniis ke tio estas pruvo: tamen, ŝi pludiris: “Kaj kiel vi scias ke vi estas freneza?”

“Unue,” diris la Kato, “hundo ne estas freneza. Vi konsentas pri tio?”

“Mi supozas ke jes,” diris Alico.



“Nu, do,” la Kato daŭrigis, “hundo grumblas kiam ĝi estas kolera, kaj skuas sian voston kiam ĝi estas feliĉa. Nu, *mi* grumblas kiam mi estas feliĉa, kaj skuas mian voston kiam mi estas kolera. Sekve, mi estas freneza.”

“*Mi* nomas tion ronronado, ne grublado,” diris Alico.

“Nomu ĝin laŭvole,” diris la Kato. “Ĉu

vi ludos kroketon kun la Reĝino hodiaŭ?”

“Tio multe plaĉus al mi,” diris Alico, “sed mi ankoraŭ ne ricevis inviton.”

“Vi vidos min tie,” diris la Kato, kaj ĝi ekmalaperis.

Tio ne multe surprizis Alicon, ĉar ŝi komencis bone kutimiĝi al la okazo de strangaj eventoj. Dum ŝi ankoraŭ rigardis la lokon kie ĝi estis, ĝi subite reaperis.

“Ankaŭ, kio okazis al la bebo?” diris la Kato. “Mi preskaŭ forgesis demandi tion.”

“Ĝi fariĝis porko,” Alico respondis tre trankvile, kvazaŭ la Kato revenis tute nature.

“Mi kredis ke tiel estos,” diris la Kato, kaj remalaperis.

Alico atendis dum kelka tempo, duone atendente ke ŝi revidos ĝin, sed ĝi ne aperis, kaj post unu-du minutoj ŝi plu marŝis direkte al la loĝloko de la Marta Leporo. “Mi jam vidis ĉapelistojn,” ŝi diris al si: “la Marta Leporo estos multe pli interesa, kaj eble, ĉar nun ne estas majo, ĝi ne estos ege



freneza—almenaŭ, ne tiom freneza kiom dum marto.” Dirante tion, ŝi suprenrigardis, kaj denove jen la Kato, sidanta sur branĉo de arbo.

“Ĉu vi diris porko aŭ korko?” diris la Kato.

“Mi diris porko,” respondis Alico; “kaj plaĉus min se vi ne plu tiom subite ekaperus kaj ekmalaperus: tio estas vere kapturna!”

“Konsentite,” diris la Kato; kaj ĉifoje ĝi malaperis tre malrapide, komencante per la pinto de la vosto kaj finante per la rideto, kiu restis kelkan tempon post la malapero de la cetera korpo.

“Nu! Mi ofte vidis katon sen rideto,” pensis Alico; “sed rideto sen kato! Mi neniam dum mia tuta vivo vidis ion pli strangan!”

Ŝi ne multe pli marŝis antaŭ ol vidi la domon de la Marta Leporo: ŝi kredis ke nepre estas la ĝusta domo, ĉar la kamentuboj havis oreelformon kaj la tagmento estis tegita per felo. La domo estis tiom granda ke ŝi ne volis pliproksimiĝi antaŭ ol mordeti iom pli de la maldekstra parto de la agariko, kaj altigi sin al ĉirkaŭ sesdek centimetroj: eĉ tiam ŝi marŝis direkte al ĝi iom timide, dirante al si, “Supozu ke ĝi efektive estas plene freneza! Mi preskaŭ preferus viziti anstataŭe la Ĉapeliston!”

ĈAPITRO VII

FRENEZA TEFESTO

TABLO estis aranĝita sub arbo antaŭ la domo, kaj la Marta Leporo kaj la Ĉapelisto trinkis teon ĉe ĝi: Gliro sidis inter ili, firme dormante, kaj la aliaj du uzis ĝin kiel kusenon, apogante siajn kubutojn per ĝi, kaj parolante trans ĝian kapon. “Tre malkomforte por la Gliro,” pensis Alico; “sed, ĉar ĝi dormas, mi supozas ke ne ĝenas ĝin.”

La tablo estis granda, sed la trio kunpremiĝis ĉe unu angulo. “Mankas spaco! Mankas spaco!” ili kriis kiam ili vidis

Alicon veni. “Estas *multa* spaco!” diris Alico indigne, kaj ŝi sidiĝis en granda brakseĝo ĉe unu fino de la tablo.

“Prenu iom da vino,” la Marta Leporo diris per kuraĝiga tono.

Alico rigardis la tutan tablon, sed videblis sur ĝi nur teo. “Mi ne vidas vinon,” ŝi komentis.

“Neniom estas,” diris la Marta Leporo.

“Do ne estis ĝentile proponi ĝin,” diris Alico kolere.

“Ne estis ĝentile sidiĝi sen invito,” diris la Marta Leporo.

“Mi ne sciis ke la tablo estas *via*,” diris Alico; “ĝi estas aranĝita por multe pli ol tri.”

“Via hararo bezonas tondiĝi,” diris la Ĉapelisto. Li jam rigardadis Alicon tre demandeme, kaj nun li parolis la unuan fojon.

“Vi bezonas lerni ne fari pripersonajn komentojn,” Alico diris iom severe: “estas tre malĝentile.”



La Ĉapelisto tre larĝe malfermis siajn okulojn; sed li *diris* nur, “Kiel korako similas al skribotablo?”

“Nu, ni amuziĝos nun!” pensis Alico. “Min ĝojigas ke ili komencas vortenigmojn—mi kredas ke mi povos diveni tion,” ŝi pludiris pervoĉe.

“Ĉu vi celas diri ke vi povos trovi la respondon?” diris la Marta Leporo.

“Ekzakte,” diris Alico.

“Do vi devus diri kion vi celas diri,” la Marta Leporo daŭrigis.

“Tiel estas,” Alico rapide respondis; “almenaŭ—almenaŭ, mi celas diri kion mi diras—estas tute same, komprenu.”

“Neniel same!” diris la Ĉapelisto. “Vi egalbone povus diri ke ‘mi vidas kion mi manĝas’ estas sama kiel ‘mi manĝas kion mi vidas’!”

“Vi egalbone povus diri,” aldonis la Marta Leporo, “ke ‘mi ŝatas kion mi ricevas’ estas sama kiel ‘mi ricevas kion mi ŝatas’!”

“Vi egalbone povus diri,” aldonis la Gliro, kiu ŝajne parolis dumdorme, “ke ‘mi spiras kiam mi dormas’ estas sama kiel ‘mi dormas kiam mi spiras’!”

“Ja estas same por vi,” diris la Ĉapelisto, kaj nun la konversacio ĉesis, kaj la grupo sidis silenta dum minuto, dum Alico pensis pri ĉio kion ŝi memoris pri korakoj kaj skribotabloj, kio ne estis multa.

La Ĉapelisto la unua rompis la silenton. “Kiu tago de la monato estas?” li diris, turnante sin al Alico: li prenis sian horloĝeton el sia poŝo, kaj rigardis ĝin maltrankvile, skuante ĝin fojfoje, kaj tenante ĝin al sia orelo.

Alico pensis dum kelka tempo, kaj poste diris: “La kvara.”

“Ĝi eraras je du tagoj!” ĝemis la Ĉapelisto. “Mi diris al vi ke butero ne taŭgas por la mekanismo!” li pludiris, rigardante kolere la Martan Leporon.

“Ĝi estis la *plej bona* butero,” la Marta Leporo humile respondis.

“Jes, sed sendube kelkaj paneroj ankaŭ eniris,” la Ĉapelisto grumblis: “ne taŭgis enmeti ĝin per la pantranĉilo.”

La Marta Leporo prenis la horloĝeton kaj malfeliĉe rigardis ĝin: post tio li trempis ĝin en sia tason da teo, kaj rerigardis ĝin: sed li ne povis elpensi ion pli dirindan ol la unua komento, “Ĝi estis la *plej bona* butero, sciu.”

Alico jam rigardadis trans lian ŝultron tre interesate. “Vere stranga horloĝo!” ŝi komentis. “Ĝi diras la tagon de la monato, kaj ne diras la horon!”

“Kial do?” murmuris la Ĉapelisto. “Ĉu *via* horloĝo diras al vi la jaron?”

“Kompreneble ne,” Alico respondis tute senhezite: “sed estas ĉar la jaro estas tiom longedaŭra.”

“Estas tute same pri *mia*,” diris la Ĉapelisto.

Alico estis plene konfuzita. La komento de la Ĉapelisto ŝajnis al ŝi tute ne havi sencon, tamen certe ĝi estis laŭgramatika. “Mi ne tute komprenas vin,” ŝi diris, laŭeble ĝentile.

“La Gliro denove dormas,” diris la Ĉapelisto, kaj li verŝis iom da varmega teo sur ĝian nazon.

La Gliro skuis sian kapon senpacience, kaj diris, sen malfermi siajn okulojn, “Kompreneble, kompreneble; mi mem intencis

diri precize tion.”

“Ĉu vi jam divenis la vortenigmon?” la Ĉapelisto diris, turninte sin denove al Alico.

“Ne, mi cedas,” Alico respondis. “Kia estas la respondo?”

“Mi tute ne scias,” diris la Ĉapelisto.

“Nek mi,” diris la Marta Leporo.

Alico ĝemis lace. “Mi opinias ke vi povus pli bone utiligi la tempon,” ŝi diris, “ol malŝpari ĝin per vortenigmoj kiuj ne havas solvon.”

“Se vi konus Tempon tiom bone kiom mi,” diris la Ĉapelisto, “vi ne parolus pri malŝparo de *ĝi*. Estas *li*.”

“Mi ne komprenas,” diris Alico.

“Kompreneble ne!” la Ĉapelisto diris, skuante sian kapon malestime. “Verŝajne vi neniam parolis al Tempo!”

“Eble ne,” Alico singardeme respondis; “sed mi scias ke mi devas bati la tempon kiam mi studas la muzikon.”

“Ha! Jen la klarigo,” diris la Ĉapelisto.

“Li ne toleras batadon. Nu, se vi nur komplezus lin, li farus preskaŭ kion ajn vi volas rilate al la horloĝo. Ekzemple, supozu ke estus la naŭa matene, ĝustempe por komenci lecionojn: vi bezonus nur flustri sugeston al Tempo, kaj ekĉirkaŭirus la horloĝo! La unua kaj duono, la horo por manĝo!”

(“Tion mi volegas,” la Marta Leporo diris al si flustre.)

“Estus bonege, certe,” diris Alico penseme: “sed tiam—mi ne estus malsata tiam, sciu.”

“Unue, ne, eble,” diris la Ĉapelisto: “sed vi povus daŭrigi tiun horon laŭdezire.”

“Ĉu tiel *vi* faras?” Alico demandis.

La Ĉapelisto kapneis morne. “Ne mi!” li respondis. “Ni kverelis la pasintan marton—tuj antaŭ ol *li* freneziĝis, sciu—” (per sia kulero li gestis al la Marta Leporo), “—estis ĉe la granda koncerto okazigita de la Reĝino de Keroj, kaj mi devis kanti,



Brilu, brilu, vespertet’!
Vi similas al komet’!

Ĉu vi eble konas la kanton?”

“Mi aŭdis ion similan,” diris Alico.

“La daŭrigo, sciu,” la Ĉapelisto pludiris,
 “estas:—

Super l’ mondo flugas vi,
Kvazaŭ teplet’ en vizi’
Brilu, brilu—”

Nun la Gliro skuetis sin, kaj komencis

kanti dormante “*Brilu, brilu, brilu, brilu—*” kaj ĝi daŭrigis tiom longe ke ili devis pinĉi ĝin por ĉesigi la sonon.

“Nu, mi apenaŭ finkantis la unuan strofon,” diris la Ĉapelisto, “kiam la Reĝino kriegis ‘Li murdas la tempojn! Dehaku lian kapon!’”

“Terure sovaĝe!” kriis Alico.

“Kaj ekde tiam,” la Ĉapelisto pludiris per morna tono, “li rifuzas ĉiun mian peton! Estas ĉiam la sesa horo, nun.”

Bela ideo ekeniris la kapon de Alico. “Ĉu tial estas tiom da teaĵoj ĉi tie?” ŝi demandis.

“Jes, jen kial,” diris la Ĉapelisto, ĝemante: “estas ĉiam la horo por tetrinkado, kaj ne estas sufiĉa tempo por lavi la telerojn inter trinksesioj.”

“Do vi konstante moviĝas al nova pozicio, mi supozas?” diris Alico.

“Ĝuste tiel,” diris la Ĉapelisto: “kiam la teleroj eluziĝas.”

“Sed kio okazas kiam vi reatingas la komencon?” Alico demandis.

“Mi proponas ŝanĝon de temo,” la Marta Leporo interrompis oscedante. “Mi enuas pro ĉio ĉi. Laŭ mi, la junulino rakontu al ni.”

“Sed mi konas neniun rakonton,” diris Alico, kiun iom alarmis la propono.

“Do rakontu la Gliro!” ili ambaŭ kriis. “Vekiĝu, Gliro!” Kaj ili pinĉis ĝin ambaŭflanke, samtempe.

La Gliro malrapide malfermis siajn okulojn. “Mi ne dormis,” ĝi diris per raŭka, febla voĉo. “Mi aŭdis ĉiun vorton diritan.”

“Rakontu al ni!” diris la Marta Leporo.

“Jes, bonvolu!” petis Alico.

“Kaj rapidu,” aldonis la Ĉapelisto, “ĉar se ne, vi reendormiĝos antaŭ ol fini.”

“Iam estis tri fratinetoj,” la Gliro komencis rapidege; “kaj ili nomiĝis Elsio, Lacio, kaj Tildo; kaj ili loĝis ĉe la fundo de puto—”

“Kion ili manĝis?” diris Alico, kiun ĉiam multe interesis manĝado kaj trinkado.

“Ili manĝis melason,” diris la Gliro, pensinte dum unu-du minutoj.

“Ili ne povus, sciuj,” Alico milde komentis. “Ili malsanus.”

“Tiel estis,” diris la Gliro; “ili *multe* malsanis.”

Alico provis imagi kia estus tia eksterordinara vivo, sed tro konfuzis ŝin, do ŝi daŭrigis: “Sed kial ili loĝis ĉe la fundo de puto?”

“Prenu pli da teo,” la Marta Leporo diris al Alico, tre fervore.

“Mi ankoraŭ prenis neniom,” Alico respondis per tono de ofendiĝo, “do mi ne povas preni pli.”

“Pli ĝuste, vi ne povas preni *malpli*,” diris la Ĉapelisto: “estas tre facile preni *pli* ol neniom.”

“Neniu demandis pri *via* opinio,” diris Alico.

“Nun kiu faras pripersonajn komentojn?”
la Ĉapelisto demandis triumfe.

Alico ne sciis ĝuste kion diri responde al tio: do ŝi prenis por si iom da teo kaj pano-kun-butero, kaj turnis sin al la Gliro, kaj ripetis sian demandon. “Kial ili loĝis ĉe la fundo de puto?”

La Gliro denove pensis dum unu aŭ du minutoj, kaj poste diris, “Ĝi estis melaso-puto.”

“Tio ne ekzistas!” Alico komencis diri tre kolere, sed la Ĉapelisto kaj la Marta Leporo diris “Ĉit! Ĉit!” kaj la Gliro paŭze komentis, “Se vi ne povas esti ĝentila, pli bone vi mem finu la rakonton laŭ via bontrovo.”

“Ne, bonvolu daŭrigi!” Alico diris tre humile. “Mi ne interrompos vin denove. Verŝajne eble ekzistas *unu*.”

“Unu, ĉu!” diris la Gliro indigne. Tamen li konsentis daŭrigi. “Kaj do tiuj tri fratinetoj—ili studis desegnadon, sciu—”

“Kion ili desegnis?” diris Alico, tute forgesante sian promeson.

“Melason,” diris la Gliro, kaj ĉifoje li tute ne pripensadis.

“Mi volas puran tason,” interrompis la Ĉapelisto: “ni ĉiuj moviĝu al nova pozicio.”

Li movis sin parolante, kaj la Gliro sekvis lin: la Marta Leporo prenis la pozicion de la Gliro, kaj Alico iom nevolonte prenis la pozicion de la Marta Leporo. Nur la Ĉapelisto profitis pro la ŝanĝo: kaj Alico multe malprofitis, ĉar la Marta Leporo ĵus akcidente verŝis la lakton sur sian teleron.

Alico ne volis reofendi la Gliron, do ŝi komencis tre zorgoplene: “Sed mi ne komprenas. Laŭ kio ili desegnis la melason?”

“Oni trinkas akvon el akvoputo,” diris la Ĉapelisto; “do mi supozas ke oni desegnas melason el melasoputo—ĉu ne, stultulo?”

“Sed ili estis *en* la puto,” Alico diris al la Gliro, decidinte ne rimarki tiun lastan komenton.

“Certe,” diris la Gliro—“entute.”

Tiu respondo tiom konfuzis kompatindan Alicon, ke ŝi lasis la Gliron plu rakonti iom longe sen interrompo.

“Ili lernis desegni,” la Gliro pludiris, oscedante kaj frotante siajn okulojn, ĉar ĝi fariĝis tre dormema; “kaj ili desegnis ĉiajn aferojn—ĉion komenciĝantan per M—”

“Kial per M?” demandis Alico.

“Kial ne?” diris la Marta Leporo.

Alico silentis.

La Gliro jam fermis siajn okulojn, kaj komencis endormiĝi; sed, pinĉite de la Ĉapelisto, ĝi revekiĝis kun krieto, kaj daŭrigis: “—komenciĝantan per M, ekzemple muskaptilojn, kaj la maron, kaj memoron, kaj multon—vi scias ke oni diras ‘multe multa’—ĉu iam vi vidis desegnon de multo?”

“Vere, ĉar vi demandas al mi,” diris

Alico, tre konfuzite, “ne, mi pensas—”

“Do ne parolu,” diris la Ĉapelisto.

Tiu malĝentileco estis pli ol povis toleri Alico: ŝi levis sin naŭzite kaj formarŝis; la Gliro tuj endormiĝis, kaj neniu el la



aliaj eĉ atentetis ŝian foriron, kvankam ŝi unu-du-foje rerigardis, duone esperante ke ili vokos al ŝi: kiam ŝi lastafoje vidis ilin, ili provadis puŝi la Gliron en la tepoton.

“Nu, certe mi neniam reiros *tien!*” diris

Alico, dum ŝi pene marŝis tra la arbaro. “Mi neniam ĉeestis pli stultan tefeston dum mia tuta vivo!”

Ĝuste kiam ŝi diris tion, ŝi rimarkis ke unu el la arboj havas pordon kiu kondukas rekte en la arbon. “Tre kurioze!” ŝi pensis. “Sed ĉio estas kurioza hodiaŭ. Kial ne tuj eniri?” Kaj enen ŝi iris.

Denove ŝi trovis sin en la longa koridoro, kaj proksima al la malgranda vitra tablo. “Nu, ĉifoje mi pli bone sukcesos,” ŝi diris al si, kaj ŝi komencis elprenante la malgrandan oran ŝlosilon, kaj malŝlosante la pordon kiu kondukas en la ĝardenon. Post tio ŝi ekkomencis mordeti la agarikon (ŝi gardis pecon de ĝi en sia poŝo) ĝis ŝi fariĝis ĉirkau tridek centimetrojn alta: post tio ŝi marŝis laŭ la malgranda koridoro: kaj post *tio*—ŝi finfine trovis sin en la bela ĝardeno, inter la brilantaj florbedoj kaj la malvarmaj fontoj.

ĈAPITRO VIII

LA KROKETLUDEJO DE LA REĜINO

GRANDA rozarbo staris apud la enirejo de la ĝardeno: la rozoj kreskantaj sur ĝi estis blankaj, sed tri ĝardenistoj rapide kolorigadis ilin ruĝaj. Alico opiniis tion tre kurioza, kaj ŝi proksimiĝis por rigardi, kaj, ĝuste kiam ŝi estis apud ili, ŝi aŭdis unu el ili diri, “Atentu, do, Kvin! Ne verŝu farbon sur min tiel!”

“Ne mi kulpas,” diris Kvin, per paŭta tono; “Sep frapis mian kubuton.”

Je tio Sep suprenrigardis kaj diris, “Jes, ja, Kvin! Ĉiam akuzu aliajn!”

“Vi ne parolu!” diris Kvin. “Jam hieraŭ mi aŭdis la Reĝinon diri ke vi indas senkapiĝon.”



“Pro kio?”
diris la unue-
parolinto.

“Tute ne
koncernas vin,
Du!” diris Sep.

“Jes, *ja*
koncernas lin!”
diris Kvin.
“Kaj mi
informos lin—
estis ĉar vi
portis al la
kuiristino tul

ipradikojn anstataŭ cepojn.”

Sep forĵetis sian broson, kaj ĵus komencis diri, “Nu, el ĉiaj maljustaj—” kiam lia okulo ekvidis Alicon, dum ŝi staris rigardante ilin, kaj li subite ĉesigis sian parolon: la

aliaj ankaŭ turnis sin por rigardi, kaj ĉiuj profunde klinis sin.

“Bonvolu diri al mi, mi petas,” diris Alico, iom timide, “kial vi farbas tiujn rozojn?”

Kvin kaj Sep diris nenion, ili nur rigardis Dun. Du komencis diri, per nelaŭta voĉo, “Nu, la fakto estas, komprenu, Fraŭlino, ĉi tiu arbo ĉi devis esti *ruĝa* rozarbo, kaj ni erare enmetis blankan, kaj se la Reĝino ekscius, ni trovus niajn kapojn dehakitaj, komprenu. Do komprenu, Fraŭlino, ni laŭeble strebas, antaŭ ŝia reveno—” Tiumomente Kvin, kiu maltrankvile transrigardis la ĝardenon, elkriis “La Reĝino! La Reĝino!” kaj la tri ĝardenistoj tuj ĵetis sin sur la teron vizaĝsube. Sonis multaj piedpaŝoj, kaj Alico turnis sin, fervora vidi la Reĝinon.

Unue venis dek soldatoj portantaj bastonojn: ĉiuj estis laŭforme similaj al la tri ĝardenistoj, oblongaj kaj plataj, kun la manoj kaj piedoj ĉe la anguloj: sekvis la

dek korteganoj; ili estis ornamitaj tute per karooj, kaj marŝis duope, same kiel la soldatoj. Post ili sekvis la reĝaj infanoj; ili estis dek, kaj la karuletoj venis gaje saltetante, man'-en-mane: ili estis ornamitaj per keroj. Sekvis la gastoj, plejparte Reĝoj kaj Reĝinoj, kaj inter ili Alico rekonis la Blankan Kuniklon: ĝi paroladis rapide kaj nervoze, ridetis pro ĉio dirita, kaj preterpasis sen rimarki ŝin. Sekvis la Bubo de Keroj, portante la kronon de la Reĝo sur karmezina velura kuseno; kaj, lasta en la granda procesio, venis LA REĜO KAJ LA REĜINO DE KEROJ.

Alico iom dubis ĉu ankaŭ ŝi devus kuŝi survizaĝe kiel la tri ĝardenistoj, sed ŝi ne memoris iun tian regulon pri procesioj; “kaj, krome, kiel utilis procesio,” pensis ŝi, “se ĉiuj devus kuŝi survizaĝe kaj tiel ne povus vidi ĝin?” Do ŝi staris kiel ĝis tiam, kaj atendis.

Kiam la procesio atingis la lokon de

Alico, ili ĉiuj haltis kaj rigardis ŝin, kaj la Reĝino diris, severe, “Kiu estas tiu?” Ŝi diris tion al la Bubo de Keroj, kiu nur klinis sin kaj ridetis responde.

“Idioto!” diris la Reĝino, skuante sian kapon sen pacience; kaj, turninte sin al Alico, ŝi daŭrigis, “Kiel vi nomiĝas, infano?”

“Mi nomiĝas Alico, via Moŝto,” diris Alico tre ĝentile; sed ŝi pludiris, nur al si, “Ho, ili estas nur ludkartaro. Ne necesas timi ilin!”

“Kaj kiuj estas *tiu*?” diris la Reĝino, indikante la tri ĝardenistojn kiuj kuŝis ĉirkaŭ la rozarbo; ĉar, komprenu, ili kuŝis survizaĝe, kaj la ilustraĵo sur iliaj dorsoj estis sama kiel tiu sur la aliaj kartoĵoj, kaj tial ŝi ne povis scii ĉu ili estas ĝardenistoj, aŭ soldatoj, aŭ korteganoj, aŭ tri el ŝiaj propraj infanoj.

“Kiel *mi* sciis?” diris Alico, kaj ŝin surprizis ŝia propra kuraĝo. “Ne koncernas *min*.”



La Reĝino fariĝis karmezina pro furiozo, kaj, kolerege rigardinte ŝin dum momento kiel sovaĝa besto, ŝi komencis krii, “Senkapigu ŝin! Senkap—”

“Absurdaĵo!” diris Alico, tre laŭte kaj decideme, kaj la Reĝino silentiĝis.

La Reĝo tuŝis ŝian brakon kaj timide diris, “Pripensu, kara: ŝi estas nur infano!”

La Reĝino forturniĝis kolere de li, kaj diris al la Bubo: “Turnu ilin!”

La Bubo obeis, tre zorge, per unu piedo.

“Leviĝu!” kriis la Reĝino per akra, laŭta voĉo, kaj la tri ĝardenistoj tuj eksaltis, kaj komencis riverenci al la Reĝo, la Reĝino, la reĝaj infanoj, kaj ĉiu alia.

“Ĉesigu tion!” kriegis la Reĝino, “Vi kapturnas.” Kaj, turninte sin al la rozarbo, ŝi pludiris, “*Kion* vi faradis ĉi tie?”

“Bonvolu, via Moŝto,” diris Du, per tre humila tono, surgenuiĝante dum li parolis, “ni penis—”

“*Mi* vidas!” diris la Reĝino, kiu intertempe ekzamenadis la rozojn. “Senkapigu ilin!” kaj la procesio plu marŝis, sed tri el la soldatoj postrestis por ekzekuti

la povrajn ĝardenistojn, kiuj kuris al Alico por protektiĝi.

“Oni ne senkapigos vin!” diris Alico, kaj ŝi metis ilin en grandan florpoton kiu staris apude. La tri soldatoj vagadis dum unu-du minutoj, serĉante ilin, kaj poste trankvile formarŝis por reatingi la aliajn.

“Ĉu vi senkapigis ilin?” kriis la Reĝino.

“Iliaj kapoj estas for, via Moŝto!” la soldatoj kriis responde.

“Bone!” kriis la Reĝino. “Ĉu vi scias ludi kroketon?”

La soldatoj silentis kaj rigardis Alicon, ĉar la demando evidente celis ŝin.

“Jes!” kriis Alico.

“Venu, do!” muĝis la Reĝino, kaj Alico eniris la proesion, demandante al si kio nun okazos.

“Estas—estas tre bela tago!” diris timida voĉo apud ŝi. Ŝi marŝadis apud la Blanka Kuniklo, kiu rigardetis malkviete ŝian vizaĝon.

“Tre,” diris Alico. “Kie estas la Dukino?”

“Ĉit! Ĉit!” diris la Kuniklo per mallaŭta, rapidema tono. Li rigardis malkviete trans sian ŝultron dum li parolis, kaj poste li levis sin sur siajn piedpintojn, metis sian buŝon proksime al ŝia orelo, kaj flustris, “Oni verdiktis ŝian ekzekutiĝon.”

“Pro kio?” diris Alico.

“Ĉu vi diris ‘Domaĝe!’?” la Kuniklo demandis.

“Tute ne,” diris Alico. “Mi ne opinias ke estas domaĝe. Mi diris ‘Pro kio?’”

“Ŝi frapis la orelojn de la Reĝino—” la Kuniklo komencis. Alico ekridis. “Ho, ĉit!” la Kuniklo flustris per timoplena tono. “La Reĝino aŭdos vin! Komprenu, ŝi venis iom malfrue, kaj la Reĝino diris—”

“Al viaj lokoj!” kriis la Reĝino per tondra voĉo, kaj oni komencis diskuradi ĉiudirekten, falpuŝante unu la alian: tamen, ili kvietiĝis post unu-du minutoj, kaj la ludo komenciĝis.

Alico opiniis ke ĝis tiam neniam ŝi vidis tiom kuriozan kriketludejon: ĝi konsistis tute el krestetoj kaj sulkoj; la krocketkugloj konsistis el vivantaj erinacoj, kaj la maleoj

el vivantaj fenikopteroj, kaj la soldatoj fleksis sin kaj staris sur siaj manoj kaj piedoj por fariĝi arkoj.



La ĉefa malfacilaĵo kiun trovis unue Alico estis manipuli sian fenikopteron: ŝi sukcesis sufiĉe komforte aranĝi

ĝian korpon sub sian brakon, kun la kruroj pendantaj, sed plejofte, ĝuste kiam ŝi sukcesis bone rektigi la kolon kaj pretis bati la erinacon per ĝia korpo, ĝi *insiste* torde turnis sin kaj rigardis ŝian vizaĝon

kun tia esprimo de senkompreno ke ŝi ne povis ne ekridi: kaj, kiam ŝi sukcesis subenigi ĝian kapon, kaj estis preta rekomenci, tre provokis ŝin trovi ke la erinaco jam malruliĝis kaj komencis forrampi: krome, kutime kresteto aŭ sulko blokis ŝin kien ajn ŝi volis bati la erinacon, kaj, ĉar la fleksitaj soldatoj konstante rektigis sin kaj marŝis al aliaj partoj de la ludejo, Alico baldaŭ konkludis ke vere la ludo estas tre malfacila.

La ludantoj ĉiuj ludis samtempe, sen atendi siajn vicojn, tutdume kverelante, kaj sencede postulante la erinacojn; kaj post tre nelonge la Reĝino furiozis, kaj ĉirkaŭstampfadis kriante, “Senkapigu lin!” aŭ “Senkapigu ŝin!” proksimume ĉiu-minute.

Alico komencis tre malkvietiĝi: estas vere ke ankoraŭ neniuj disputo estiĝis inter ŝi kaj la Reĝino, sed ŝi sciis ke tio povus okazi je iu minuto, “kaj tiam,”

pensis ŝi, “kio okazus al mi? Oni amegas senkapigi, ĉi tie: plej mirige estas ke plu vivas iu!”

Ŝi serĉis ian metodon eskapi, kaj demandis al si kiel foriri sen rimarkiĝi, tiam ŝi ekrimarkis kuriozan aperaĵon en la aero: ĝi multe perpleksis ŝin unue, sed rigardinte ĝin dum unu-du minutoj ŝi rekonis ke ĝi estas rideto, kaj ŝi diris al si, “Jen la Ĉeŝira Kato: nun mi povos konversacii.”

“Kiel estas?” diris la Kato, tuj kiam estis sufiĉa buŝo por paroli.

Alico atendis ĝis aperis la okuloj, kaj tiam kapjesis. “Ne utilos paroli al ĝi,” ŝi pensis, “antaŭ ol aperos ĝiaj oreloj, aŭ almenaŭ unu el ili.” Post plia minuto la tuta kapo aperis, kaj tiam Alico demetis sian fenikopteron, kaj komencis raporti pri la ludo, estante tre ĝoja ĉar iu aŭskultas ŝin. La Kato ŝajne opiniis ke sufiĉe da ĝi nun videblas, kaj pliaj partoj ne aperis.

“Mi opinias ke ili tute ne honeste ludas,” Alico komencis, iom plende, “kaj ĉiuj kverelas tiom ke oni ne povas aŭdi sin paroli—kaj ŝajnas ke tute ne estas reguloj; se reguloj ja ekzistas, neniuj atentis ilin—kaj estas konfuzego ke ĉio vivas; ekzemple, tie estas la arko tra kiun mi devos bati erinacon, ĝi promenas ĉe la alia finaĵo de la ĝardeno—kaj mi ĵus devis kroketi la erinacon de la Reĝino, sed ĝi forkuris kiam ĝi vidis mian erinacon veni!”

“Kaj kiom plaĉas al vi la Reĝino?” diris la Kato per mallaŭta voĉo.

“Neniom,” diris Alico: “ŝi tute—” Ĝuste tiam ŝi rimarkis ke la Reĝino staras proksime malantaŭ ŝi, aŭskultante: do ŝi pludiris “—sendube venkos, tiel ke apenaŭ utilas fini la ludon.”

La Reĝino ridetis kaj forpaŝis.

“Al *kiu* vi parolas?” diris la Reĝo, venante al Alico, kaj rigardante la kapon

de la Kato tre dube.

“Amiko mia—Ĉeŝira Kato,” diris Alico: “permesu ke mi konigu vin.”

“Al mi tute ne plaĉas ĝia aspekto,” diris la Reĝo: “tamen, ĝi rajtas kisi mian manon, se ĝi deziras.”

“Mi preferas ne fari tion,” la Kato komentis.

“Ne impertinentu,” diris la Reĝo, “kaj ne rigardu min tiel!” Li paŝis malantaŭ Alicon dum li parolis.

“Al vizaĝo de l’ reĝo rigardas la kato,”³ diris Alico. “Mi legis tion en iu libro, sed mi ne memoras en kiu.”

“Nu, ĝi estas forigenda,” diris la Reĝo tre decideme, kaj li vokis al la Reĝino, kiu preterpasadis tiumomente, “Kara! Bonvolu forigi ĉi tiun katon!”

La Reĝino konis nur unu metodon solvi ĉian problemon, grandan aŭ malgrandan. “Senkapigu ĝin!” ŝi diris, sen eĉ rigardi.

³ Angla proverbo. = Reguloj ne estas ĉiam aplikendaj.

“Mi mem venigos la ekzekutiston,” diris la Reĝo fervore, kaj li forrapidis.

Alico opiniis ke estos bone reiri kaj vidi kiel progresas la ludo, ĉar ŝi aŭdis la foran voĉon de la Reĝino, kiu pasie kriadis. Ŝi jam aŭdis ŝin verdikti ke tri ludantoj ekzekutiĝu ĉar ili malatentis siajn vicojn, kaj al ŝi tute ne plaĉis la prospekto, ĉar la ludo estis tiom konfuzita ke ŝi neniam sciis ĉu aŭ ne estas ŝia vico. Do ŝi foriris serĉi sian erinaco.

La erinaco batalis kontraŭ alia erinaco, kaj al Alico tio ŝajnis tre bona oportuno kroketi unu el ili per la alia: la sola problemo estis ke ŝia fenikoptero jam transiris al la alia flanko de la ĝardeno, kaj tie Alico povis vidi ke ĝi iom senkapable provas flugi en arbon.

Kiam ŝi fine kaptis la fenikopteron kaj reportis ĝin, la batalo jam ĉesis kaj ambaŭ erinacoj ne plu estis videblaj: “sed ne multe gravas,” pensis Alico, “ĉar ĉiuj

arkoj jam foriris de ĉi tiu flanko de la ludejo.” Do ŝi metis la fenikopteron sub sian brakon, por ke ĝi ne denove eskapu, kaj reiris por iom pli konversacii kun sia amiko.

Kiam ŝi reatingis la Ĉeŝiran Katon, ŝin surprizis la trovo ke tre granda amaso da homoj ĉirkaŭis ĝin: disputo okazis inter la ekzekutisto, la Reĝo, kaj la Reĝino, kiuj ĉiuj samtempe parolis, dum ĉiuj aliaj tute silentis kaj aspektis tre nekomfortaj.

Tuj kiam Alico aperis, ŝin alvokis ĉiuj tri ke ŝi solvu la disputon, kaj ili ripetis siajn argumentojn al ŝi, kvankam, ĉar ili ĉiuj parolis samtempe, estis tre malfacile por ŝi kompreni ĝuste kion ili diras.

La argumento de la ekzekutisto estis, ke ne eblas detranĉi kapon se ne estas korpo de kiu oni tranĉu ĝin: ke ĝis nun li neniam devis fari ion tian, kaj li ne komencos nun je *lia* aĝo.



La argumento de la Reĝo estis, ke ĉio kun kapo estas senkapigebla, kaj oni ne diru absurdaĵojn.

La argumento de la Regino estis, ke se oni ne agos pli rapide ol tuj, ŝi ekzekutigos ĉiujn ĉeestantojn. (Ĉi tiu lasta

komento tre malgajigis la tutan grupon.)

Alico povis elpensi nenion alian ol “Ĝi apartenas al la Dukino: demandu al ŝi pri ĝi.”

“Ŝi estas en karcero,” la Reĝino diris al la ekzekutisto: “alvenigu ŝin.” Kaj la ekzekutisto forrapidis kiel sago.

La kapo de la Kato komencis fadi tuj kiam li estis for, kaj kiam li revenis kun la Dukino, ĝi jam tute malaperis; do la Reĝo kaj la ekzekutisto senkomprene diskuradis serĉante ĝin, dum la aliaj grupanoj reiris ludi.

ĈAPITRO IX

LA RAKONTO DE LA FALSĤELONIO

“VI ne povas koncepti kiom mi ĝojas revidi vin, kara oldulino!” diris la Dukino, dum ŝi ame kunligis sian brakon kun tiu de Alico, kaj ili formarĝis kune.

Alico tre ĝojis trovi ŝin tiom bonhumora, kaj pensis ke eble nur pro la pipro ŝi estis tiom sovaĝa kiam ili renkontiĝis en la kuirejo. “Kiam *mi* fariĝos Dukino,” ŝi diris al si (tamen, ne tre esperoplene), “mi tute *ne* havos pipron en mia kuirejo.

Supo estas sufiĉe bona sen ĝi—eble pipro ĉiam estas la kaŭzo de mishumoro,” ŝi pludiris, kun granda plezuro pro sia trovo de novspeca regulo, “kaj vinagro akrigas—kaj kamomilo amarigas—kaj—kaj hordekando kaj tiaĵoj dolĉhumorigas infanojn. Se oni ja sciis *tion*: oni ne agus tiom avare rilate al ĝi, sciu—”

Ŝi jam plene forgesis la Dukinon, kaj iomete alarmis ŝin aŭdi ŝian voĉon proksime al sia orelo. “Vi pensas pri io, kara, kaj pro tio vi forgesas paroli. Mi ne povas diri al vi ĝuste nun la moralaĵon de tio, sed baldaŭ mi memoros ĝin.”

“Eble ĝi ne havas,” Alico kuraĝis komenti.

“Tt, tt, infano!” diris la Dukino. “Ĉio havas moralaĵon, se oni povas trovi ĝin.” Kaj ŝi premegis sin al la flanko de Alico dum ŝi parolis.

Al Alico ne multe plaĉis ŝia proksimegeco:

unue, ĉar la Dukino estis *tre* malbela, kaj due, ĉar ŝi estis ĝuste sufiĉe alta por



apogi sian mentonon per la ŝultro de Alico, kaj ĝi estis malkomforte akramentono.

Tamen, ŝi ne volis esti malĝentila: do ŝi toleris ĝin laŭeble.

“La ludo progresas iom pli bone nun,”

ŝi diris, por iomete plivigligi la konversacion.

“’stas vere,” diris la Dukino: “kaj la moralaĵo de tio estas—‘Ho, pro amo, pro amo, ĉirkaŭiras la mondo!’”

“Iu diris,” Alico flustris, “ke tio okazas

ĉar ĉiu atentis la proprajn aferojn!”

“Ha, nu! La signifo estas sama,” diris la Dukino, premante sian akran mentoneton en la ŝultron de Alico dum ŝi pludiris, “kaj la moralaĵo de *tio* estas—prizorgu la penson, kaj l’ abundo prizorgos sin mem.⁴”

“Kiom ŝi amas trovi moralaĵon en ĉio!” Alico pensis.

“Verŝajne vi demandas al vi kial mi ne ĉirkaŭbrakumas vin,” la Dukino diris, post paŭzo: “estas ĉar mi estas necerta pri la humoro de via fenikoptero. Ĉu mi provu?”

“Ĝi eble mordos,” Alico zorgeme respondis, ĉar ŝi tute ne deziris ke la Dukino faru tian provon.

“Tute vere,” diris la Dukino: “kaj fenikopteroj kaj mustardo mordas. Kaj la moralaĵo de tio estas—‘Birdoj samplumaj flugas kunaj.’⁵”

“Sed mustardo ne estas birdo,” Alico komentis.

“Vi pravas, kiel kutime,” diris la Dukino:

⁴ Parodio de Angla proverbo “Prizorgu la pensojn kaj la pundojn prizorgos sin mem”.

⁵ Angla proverbo. = Similaĵoj havas komunan karakteron.

“kiom klare vi esprimas la aferojn!”

“Ĝi estas mineralo, mi *kredas*,” diris Alico.

“Kompreneble,” diris la Dukino, kiu ŝajne estis preta konsenti al ĉio dirita de Alico; “troviĝas granda mustardomin’ proksime de ĉi tie. Kaj la moralaĵo de tio estas—‘Ju pli oni riĉigas min, des malpli oni riĉigas vin’.”

“Ho, mi scias!” kriis Alico, kiu ne atentis tiun lastan komenton, “ĝi estas legomo. Ĝi ne aspektas legomo, sed ĝi ja estas.”

“Mi plene konsentas kun vi,” diris la Dukino; “kaj la moralaĵo de tio estas—‘Estu kia vi volas ŝajni’—aŭ, se vi volas ke mi parolu pli simple—‘Neniam imagu vin ne esti alia ol kiel ŝajnas al aliaj ke kio vi estis aŭ eble estus ne estis alia ol kia vi estus alie al ili ŝajninta.’”

“Mi kredas ke mi pli bone komprenus tion,” Alico diris tre ĝentile, “se mi povus vidi ĝin skribita: sed mi ne povas plene kompreni la sencon dum vi parolas ĝin.”

“Tio estas nenio, kompare kun kion mi

povus diri se mi volus,” la Dukino respondis, laŭtone tre plaĉite.

“Bonvolu ne ĝeni vin per pli detala parolo,” diris Alico.

“Ho, ne menciuj ĝenon!” diris la Dukino. “Mi donacas al vi ĉion diritan.”

“Avarema donaco!” pensis Alico. “Feliĉe, oni ne donas naskiĝtagajn donacojn tiajn!” Sed ŝi ne kuraĝis diri tion pervoĉe.

“Ĉu denove pensanta?” la Dukino demandis, denove premante per sia akra mentoneto.

“Mi rajtas pensi,” diris Alico akre, ĉar ŝi komencis maltrankviliĝi.

“Proksimume tiom rajtas,” diris la Dukino, “kiom porkoj rajtas flugi: kaj la m—”

Sed nun, tre surprize al Alico, la voĉo de la Dukino fadis, eĉ en la mezo de ŝia amata vorto ‘moralajo’, kaj la brako ligita kun ŝia komencis tremi. Alico suprenrigardis kaj jen la Reĝino staras antaŭ ili, kun la brakoj kunfalditaj, kaj sulkigante la frunton

kiel tondroŝtormo.

“Bela tago, via Moŝto!” la Dukino komencis per nelaŭta, febla voĉo.

“Nu, mi honeste avertas vin,” kriis la Reĝino, stampfante dum ŝi parolis; “aŭ via aŭ via kapo estu for, kaj jam pli rapide ol tuj! Elektu!”

La Dukino elektis, kaj post malgranda momento jam estis for.

“Ni daŭrigu la ludon,” la Reĝino diris al Alico; kaj pro timo Alico ne kuraĝis diri eĉ vorton, sed malrapide sekvis ŝin al la krokethudejo.

La aliaj gastoj utiligis la foreston de la Reĝino kaj ripozis en la ombroj: tamen, tuj kiam ili vidis ŝin, ili rapidis denove ludadi, kaj la Reĝino nur komentis ke eĉ momenta prokrasto signifos ilian morton.

Tutdum la ludado la Reĝino neniam ĉesis kvereli kun la aliaj ludantoj kaj krei “Senkapigu lin!” aŭ “Senkapigu ŝin!” La kondamnitojn arestis la soldatoj, kiuj

kompreneble devis ĉesi esti arkoj por fari tion, tiel ke post eble duona horo plene mankis arkoj, kaj ĉiuj ludantoj—escepte de la Reĝo, la Reĝino, kaj Alico, estis arestitaj kaj ekzekutotaj.

La Reĝino ĉesis ĉirkaŭkuradi, tute senspire, kaj diris al Alico, “Ĉu vi jam renkontis la Falsĥelonion?”

“Ne,” diris Alico. “Mi eĉ ne scias kio estas Falsĥelonio.”

“Oni faras Falsĥelonian Supon⁶ per ĝi,” diris la Reĝino.

“Mi neniam vidis tian beston, nek aŭdis pri ĝi,” diris Alico.

“Venu, do,” diris la Reĝino, “kaj li rakontos al vi sian historion.”

Dum ili kune formarĝis, Alico aŭdis la Reĝon diri per nelaŭta voĉo al la tuta grupo, “Vi ĉiuj estas pardonitaj.” “Nu, *tio* estas bona!” ŝi diris al si, ĉar ŝin tre malfeliĉigis la nombro da ekzekutoj ordonitaj de la Reĝino.

⁶ Supo el bovidaĵo, imitanta la guston de supo el verdĥelonioaĵo.



Tre baldaŭ ili atingis Grifon kiu kuŝis dormante en la sunlumo. (Se vi ne scias kio estas Grifo, rigardu la bildon.) “Vigligu vin, pigrulo!” diris la Reĝino, “kaj konduku ĉi tiun junulinon por renkonti la Falsĥelonion kaj por aŭdi lian historion. Mi devas reiri por prizorgi ekzekutojn kiujn mi ordonis,” kaj ŝi formarŝis, lasante Alicon sola kun la Grifo. Al Alico la besto ne aspektis tute fidinda, sed ĝenerale ŝi opiniis ke estos egale sendanĝere resti kun ĝi

kiel sekvi tiun sovaĝan Reĝinon: do ŝi atendis.

La Grifo sidiĝis kaj frotis siajn okulojn: post tio ĝi rigardis la Reĝinon ĝis ŝi estis ne plu videbla: kaj post tio ĝi ridklukis. “Kia amuzo!” diris la Grifo, duone al si, duone al Alico.

“*Kio* amuzas?” diris Alico.

“Nu, ŝi,” diris la Grifo. “Ŝi nur imagas, ja: oni neniam ekzekutas neniun, komprenu. Venu!”

“Ĉiu diras ‘venu!’ ĉi tie,” pensis Alico, dum ŝi malrapide sekvis ĝin: “Neniam dum mia tuta vivo oni tiom ordonis al mi, neniam!”

Ili ne tre longe marŝis antaŭ ol vidi el for la Falsĥelonion, kiu sidis malfeliĉe kaj sole sur malgranda roka breto, kaj, dum ili proksimiĝis, Alico povis aŭdi lin ĝemadi kvazaŭ lia koro rompiĝas. Ŝi profunde kompatis lin. “Pro kio li malfeliĉas?” ŝi demandis al la Grifo. Kaj la Grifo respondis, per vortoj preskaŭ identaj kun la antaŭaj, “Li nur imagas, ja: li ne havas nenan malfeliĉon,

komprene. Venu!”

Do ili iris al la Falsĥelonio, kiu rigardis ilin per grandaj okuloj plenaj de larmoj, sed diris nenion.

“Ĉi tiu ĉi junulino,” diris la Grifo, “ŝi volas por koni vian historion, tion ŝi volas.”⁷

“Mi rakontos ĝin al ŝi,” diris la Falsĥelonio per profunda, kava tono. “Sidiĝu, vi ambaŭ, kaj eĉ ne unu vorton diru antaŭ ol mi finos.”

Do ili sidiĝis, kaj neniu parolis dum pluraj minutoj. Alico pensis, “Mi ne komprenas kiel li *povos* fini, se li ne komencos.” Sed ŝi atendis pacience.

“Iam,” diris la Falsĥelonio fine, kun profunda ĝemo, “mi estis vera Ĥelonio.”

Tiujn vortojn sekvis tre longa silento, kiun interrompis nur fojfoja krieto “Hjckrrh!” de la Grifo, kaj la konstanta profunda plorado de la Falsĥelonio. Alico preskaŭ leviĝis kaj diris, “Dankon, Sinjoro, pro via tre interesa rakonto,” sed ŝi pensis ke neeviteble *devas* esti pli, do ŝi sidis kviete kaj diris nenion.

⁷ La Grifo parolas Grifan dialekton, tial liaj stangaj esprimoj.



“Kiam ni estis junaj,” la Falsĥelonio fine daŭrigis, pli trankvile, kvankam li ankoraŭ fojfoje ploris, “ni lernis en lernejo en la

maro. La mastro estis maljuna Ĥelonio—ni kutime nomis lin Testudo—”

“Kial vi nomis lin Testudo, se li ne estis tio?” Alico demandis.

“Ni nomis lin Testudo ĉar li testis nin,” diris la Falsĥelonio kolere; “vere vi estas stulta!”

“Vi devus honti farante tiom simplan demandon,” aldonis la Grifo; kaj ili ambaŭ sidis silente kaj rigardis kompatindan Alicon, kiu sentis sin preta subiĝi en la teron. Fine la Grifo diris al la Falsĥelonio, “Plu rakontu, oldulo! Ne perdu la tutan tagon!” kaj li daŭrigis per ĉi tiuj vortoj:—

“Jes, ni studis en lernejo en la maro, kvankam eble vi ne kredas tion—”

“Mi neniam diris ke mi ne kredas!” interrompis Alico.

“Jes ja,” diris la Falsĥelonio.

“Ĉit!” aldonis la Grifo, antaŭ ol Alico povis denove paroli. La Falsĥelonio daŭrigis.

“Ni ricevis la plej bonan edukon—efektive,

ni vizitis la lernejon ĉiutage—”

“Ankaŭ *mi* studis en taglernejo,” diris Alico. “Ne necesas tiom fieri.”

“Kun ekstraĵoj?” demandis la Falsĥelonio, iom malkviete.

“Jes,” diris Alico, “ni studis la Francan kaj muzikon.”

“Kaj lavadon?” diris la Falsĥelonio.

“Certe ne!” diris Alico indigne.

“Ha! Do via ne estis vere bona lernejo,” diris la Falsĥelonio per tono de granda kvietiĝo. “Nu, en *nia* oni aldonis, fine de la listo, ‘Franca, muziko, *kaj lavado*—ekstraj.’”

“Vi tamen ne multe bezonis ĝin,” diris Alico; “ĉar vi loĝis sur la fundo de la maro.”

“Mi ne estis sufiĉe riĉa por studi ĝin,” diris la Falsĥelonio ĝemante. “Mi studis nur la norman kurson.”

“El kio ĝi konsistis?” demandis Alico.

“Regado kaj Kribrado, kompreneble, estis la unuaj,” la Falsĥelonio respondis; “kaj sekvis la diversaj fakoj de Aritmetiko—

Ambicio, Subbrakado, Multplikado kaj Sinvido.”

“Mi neniam aŭdis pri ‘Multplikado’,” Alico kuraĝis diri. “Kio ĝi estas?”

La Grifo levis ambaŭ antaŭpiedojn surprizite. “Neniam aŭdis pri multplikado!” ĝi krietis. “Vi scias kion signifas multe *ekspliki*, supozeble.”

“Jes,” diris Alico dubeme: “ĝi signifas—fari—ian—longan—klarigon.”

“Do,” la Grifo daŭrigis, “se vi ne komprenas kio estas *mult*-pliki, vi *vere* estas stultulo.”

Alico ne sentis kuraĝon pli demandi pri tio, do ŝi turnis sin al la Falsĥelonio, kaj diris, “Kion alian vi studis?”

“Nu, Misterion,” la Falsĥelonio respondis, kalkulante la temojn per siaj piedpalmoj,—“Misterion, antikvan kaj modernan, kun Marografio: sekvis Dissegado—la Distren-instruisto estis maljuna kongra angilo, kiu venis unufoje dum ĉiu semajno: *li* instruis al ni Dissegadon, Prizadon, suran kaj suban,

kaj Olean Penetradon.”

“Kia estis *tio?*” diris Alico.

“Nu, mi mem ne povas montri al vi,” la Falsĥelonio diris: “mi estas tro rigida. Kaj la Grifo neniam lernis ĝin.”

“Malsufiĉe da tempo,” diris la Grifo: “sed mi lernis de la Instruisto de Klasikoj. Li estis olda krabo, *li*.”

“Mi neniam lernis de li,” la Falsĥelonio diris ĝemante. “Li instruadis pri La Ino kaj Bleko, laŭdire.”

“Tiel estis, tiel estis,” diris la Grifo, siavice ĝemante, kaj ambaŭ bestoj kaŝis sian vizaĝon per siaj piedoj.

“Kaj kiom da horoj ĉiutage vi studis?” diris Alico, rapidante ŝanĝi la temon.

“Dek horojn dum la unua tago,” diris la Falsĥelonio: “naŭ dum la sekva, kaj tiel plu.”

“Kia kurioza aranĝo!” krietis Alico.

“Tial oni nomas la klasojn *lecionoj*,” la Grifo komentis: “ĉar ĉiutage oni studas nur onon.”

Tio estis tute nova ideo por Alico, kaj ŝi pensis pri ĝi iom antaŭ ol denove paroli. “Do la dek-unua tago devis esti feritago.”

“Kompreneble,” diris la Falsĥelonio.

“Kaj kio okazis dum la dek-dua tago?” Alico daŭrigis fervore.

“Sufiĉe pri lecionoj,” la Grifo interrompis per tre decida tonio. “Rakontu al ŝi nun iom pri la ludoj.”

ĈAPITRO X

LA OMARA KVADRILO

La Falsĥelonio profunde ĝemis kaj tiris la dorson de unu piedpalmo trans siajn okulojn. Li rigardis Alicon kaj penis paroli, sed, dum unu-du minutoj, larmoj nebligis tion. “Samkiel se li havus oston en sia gorĝo,” diris la Grifo; kaj ĝi ekkomencis skui lin kaj bati lian dorson. Fine la Falsĥelonio rekapablis uzi sian voĉon, kaj, kun larmoj fluantaj sur liaj vangoj, li rekomencis:

“Vi eble ne multe loĝis sub la maro—” (“Ne,” diris Alico)—“kaj eble oni neniam

konatigis al vi omaron—” (Alico komencis diri “Mi iam gustumis—” sed haltigis sin rapide, kaj diris, “Ne, neniam,)” “—do vi tute ne povas koncepti kiom plezuriga estas Omara Kvadrilo!”

“Tute ne,” diris Alico. “Kia danco ĝi estas?”

“Nu,” diris la Grifo, “oni unue enviciĝas laŭlonge de la marbordo—”

“Du vicoj!” kriis la Falsĥelonio. “Fokoj, ĥelonioj, salmoj, kaj la ceteraj: poste, foriginte ĉiujn meduzojn—”

“*Tio* kutime estas longedaŭra tasko,” interrompis la Grifo.

“—oni antaŭenpaŝas dufoje—”

“Ĉiu kun omaro kiel partnero!” kriis la Grifo.

“Kompreneble,” la Falsĥelonio diris: “antaŭenpaŝu dufoje, turniĝu al partneroj—”

“—interŝanĝu omarojn, kaj retreniru samorde,” daŭrigis la Grifo.

“Kaj post tio, komprenu,” pludiris la

Falsĥelonio, “ĵetu la—”

“La omarojn!” kriis la Grifo, saltante en la aeron.

“—kiel eble plej for en la maron—”

“Naĝe sekvu ilin!” kriegis la Grifo.

“Transkapen saltu en la maro!” kriis la Falsĥelonio, kapriolante senrezerve.

“Denove interŝanĝu omarojn!” kriis la Grifo plej laŭte.

“Retren al la tero, kaj—jen la tuta unua parto,” diris la Falsĥelonio, subite nelaŭtigante sian voĉon, kaj la du uloj, kiuj ĝis tiam ĉirkaŭsaltadis freneze, residiĝis tre malfeliĉe kaj silente, kaj rigardis Alicon.

“Sendube la danco estas tre bela,” diris Alico timide.

“Ĉu vi deziras vidi iom el ĝi?” diris la Falsĥelonio.

“Tre fervore,” diris Alico.

“Jen, ni provu la unuan parton!” diris la Falsĥelonio al la Grifo. “Ni povas danci sen la omaroj, komprenu. Kiu el ni kantu?”



“Ho, *vi* kantu,” diris la Grifo. “Mi jam forgesis la vortojn.”

Do ili komencis solene danci ĉirkaŭ Alicon, fojfoje tretante ŝiajn piedfingrojn kiam ili tro proksimiĝis, kaj gestante per siaj antaŭpiedoj por bati la tempojn, dum

la Falsĥelonio kantis ĉi tion, tre malrapide
kaj morne:—

*“Bonvolu marŝi pli rapide,” diris al helik’ merlang’,
“Foceno tretas mian voston kaj elfluas mia sang’.
La ĥelonioj kaj omaroj nin sur plaĝ’ atendas por
Ke ni renkontu ilin kaj ni ĉiuj dancu kun fervor’.
Ĉu ne, ĉu jes, ĉu ne, ĉu jes vi venos por la danc’?
Ĉu jes, ĉu ne, ĉu jes, ĉu ne vi venos por la danc’?*

*“Ĉar tre agrable estos kiam oni ĵetos nin en mar-
on malproksimen kun la ĝojaj ĥelonioj kaj omar-
oj!” sed respondis la heliko ke tro grandas la distanc’.
Elkore li lin dankas, sed ne venos al la danc’.
Ne volas aŭ ne povas kune veni al la danc’.
Ne povas aŭ ne volas kune veni al la danc’.*

“Ĉu vere gravas la distanco?” lin demandis la amik’.

“De nia bordo al alia povos naĝi ni, Helik’.

*Ju pli foros ni de l’ Angla, des pli malfor de la Franc-
a; do vi al la fest’, amata best’, kunvenu por la danc’.*

Ĉu jes, ĉu ne, ĉu jes, ĉu ne vi venos por la danc’?

Ĉu ne, ĉu jes, ĉu ne, ĉu jes vi venos por la danc’?”

“Dankon, estas tre interese rigardi la dancon,” diris Alico, danka ĉar ili finis; “kaj mi ege ŝatas tiun kuriozan kanton pri la merlango!”

“Nu, rilate la merlangojn,” diris la Falsĥelonio, “ili—vi jam vidis ilin, kompreneble.”

“Jes,” diris Alico, “mi ofte vidis ilin ĉe la tagman-” ŝi eksilentis abrupte.

“Mi ne scias kie estas la Tagman,” diris la Falsĥelonio, “sed, ĉar vi tiom ofte vidis ilin, kompreneble vi scias kiel ili aspektas?”

“Mi kredas ke jes,” Alico respondis

penseme. “Ili tenas la voston en la buŝo—kaj estas kovritaj per paneroj.”

“Vi eraras pri la paneroj,” diris la Falsĥelonio: “paneroj forlaviĝus en la maro. Sed ili ja tenas la voston en la buŝo; kaj la kialo estas—” nun la Falsĥelonio oscedis kaj fermis siajn okulojn—“Diru al ŝi la kialon kaj ĉion tian,” li diris al la Grifo.

“La kialo estas,” diris la Grifo, “ke ili *insistis* iri kun la omaroj al la danco. Do ili ĵetiĝis malproksimen en la maron. Do ili devis longe fali. Do iliaj vostoĵ fiksiĝis en iliaj buŝoj. Do ili ne povis elpreni ilin. Jen ĉio.”

“Dankon,” diris Alico, “estas tre interese. Mi neniam antaŭe sciis tion pri merlangoj.”

“Mi povas diri al vi ankaŭ ion pri helikoj, se vi deziras,” diris la Grifo. “Ĉu vi scias kial ili nomiĝas helikoj?”

“Mi neniam pripensis tion,” diris Alico. “Kial?”

“*Ili poluras la botojn kaj ŝuojn,*” la Grifo respondis solene.

Alico plene perpleksiĝis. “Poluras la botojn kaj ŝuojn?” ŝi ripetis per senkomprena tono.

“Nu, kiel oni poluras *viajn* ŝuojn?” diris la Grifo. “Kiel oni nomas la arton nigrigi ilin?”

Alico rigardis siajn ŝuojn kaj pensis iom antaŭ ol respondi. “Nigriko, mi supozas.”

“Botojn kaj ŝuojn sub la maro,” la Grifo daŭrigis per basa voĉo, “oni heligas per heliko. Nun vi scias.”

“Kaj el kio ili konsistas?” Alico demandis tre scivole.

“Plendoj kaj kalkuloj, kompreneble,” la Falsŝelonio diris, iom senpaciencie: “ĉiu salikoko povus respondi tion.” Kaj la Grifo aldonis, “Nun ni aŭskultu kelkajn *viajn* aventurojn.”

“Mi povus rakonti miajn aventurojn—de

la komenco de la hodiaŭa mateno,” diris Alico, iom timide: “sed ne utilus paroli pri hieraŭ, ĉar mi estis alia persono tiam.”

“Klarigu tion,” diris la Falsĥelonio.

“Ne, ne! Unue la aventuroj,” diris la Grifo per senpacienca tono: “klarigoj bezonas multegan tempon.”

Do Alico komencis rakonti al ili siajn aventurojn, ekde kiam ŝi unue vidis la Blankan Kuniklon. Unue ŝi estis iomete nervoza, ĉar la du bestoj tre proksimiĝis al ŝi, po unu ĉiufanke, kaj malfermis siajn okulojn kaj buŝon *tre* larĝe; sed ŝi plikuraĝiĝis dum ŝi rakontis. Ŝiaj aŭskultantoj tute silentis ĝis ŝi atingis la parton pri la deklamado de ‘*Vi estas maljuna, Patro Vilhelmo*’ al la Raŭpo, kiam la vortoj fariĝis tute malĝustaj, kaj la Falsĥelonio forte enspiris kaj diris, “Tre kurioze!”

“Preskaŭ laŭeble plej kurioze,” diris la Grifo.

“Tute malĝustaj!” la Falsĥelonio ripetis penseme. “Mi deziras aŭdi ŝin provi deklamon nun. Ordonu ke ŝi komencu.” Li rigardis la Grifon kvazaŭ kredante ke ĝi iel estas aŭtoritatulo por Alico.

“Stariĝu kaj deklamu ‘*Jen la Voĉ’ de l’ Pigrulo,*’” diris la Grifo.

“Kiom la bestoj ordonas kaj devigas deklami!” pensis Alico. “Estus egale bone esti en la lernejo.” Tamen ŝi leviĝis kaj komencis deklami ĝin, sed ŝia kapo estis plena de la Omar-Kvadrilo, kaj ŝi apenaŭ sciis kion ŝi diras; kaj la vortoj ja fariĝis tre kuriozaj:—

*Jen la voĉ’ de l’ Omaro: mi aŭdis lin diri
 “Vi min bakis tro longe, mi devos min ŝmiri.”
 Kiel ganso per brovo do li per la nazo
 Pli ordigas la zonon; post tiu emfazo
 Li staras ĉeborde kaj svingas pafarkon:
 Tiel gaje kaj ŝerce li mokas la Ŝarkon:
 Sed se venas la tajdo kaj ŝarkoj alnaĝas,
 Lia voĉo timidas kaj li malkuraĝas.*

“La vortoj estis tre diferencaj kiam *mi* deklamadis ĝin en mia infanaĝo,” diris la Grifo.

“Nu, mi neniam antaŭe aŭdis ĝin,” diris la Falsĥelonio; “sed ĝi sonas nekutima absurdaĵo.”

Alico diris nenion: ŝi sidiĝis kun la



vizaĝo en la manoj, demandante al si ĉu *iam* denove ĉio estos normala.

“Mi volas ke ŝi klarigu ĝin,” diris la Falsĥelonio.

“Ŝi ne povas klarigi,” diris la Grifo rapide. “Deklamu la duan strofon.”

“Sed pri lia zono?” la Falsĥelonio persistis. “Kiel li *povus* ordigi ĝin per sia nazo?”

“Estas la unua pozicio dum dancado,” Alico diris, sed ŝin multe konsternis la tuto, kaj ŝi volegis ke ili diskutu alian temon.

“Deklamu la sekvan strofon,” la Grifo ripetis: “ĝi komenciĝas per ‘*Dum ĝardenon mi pasis*’.” Alico ne kuraĝis malobei, kvankam ŝi estis certa ke ŝi fuŝos ĝin, kaj ŝi daŭrigis per trema voĉo:—

Dum ĝardenon mi pasis, jen stranga afero
Ĉar pasteĉon manĝadis la Strig’ kaj Pantero:
Por Panter’ rezerviĝis viando kaj pasto,
Kaj restis la ujo por manĝ’ de la gasto.

*Post la fino de l' manĝo omaĝis Pantero
Al la Strig' per kompleza donac' de kulero,
Per tranĉilo kaj forko Panter' kompletigon
De l' bankedo estigis manĝante la—*

“Kiel utilas ripeti ĉion tian,” la Falsĥelonio interrompis, “se vi ne klarigas dum vi rakontas? *Mi* neniam aŭdis ion pli konfuzan.”

“Jes, mi opinias ke plej bone estos ke vi ne plu deklamu,” diris la Grifo, kaj Alico tre volonte konsentis.

“Ĉu ni provu alian parton de la Omar-Kvadrilo?” la Grifo daŭrigis. “Aŭ ĉu vi preferas ke la Falsĥelonio kantu por ni?”

“Ho, kanton mi petas, se la Falsĥelonio komplezos,” Alico respondis, tiom fervore ke la Grifo diris per tono indikanta ofendiĝon, “Hm! Vere nekredebla gusto! Kantu por ŝi ‘*Ĥelonia Supo*’, oldulo!”

La Falsĥelonio ĝemis profunde, kaj komencis, per voĉo preskaŭ sufokita de plorado, kanti ĉi tion:—

*Verda kaj riĉa Supo bela
 Atendas ĝi en ujo hela!
 Ĝin trinkus ĝoje eĉ la lupo!
 Sup' de l' vespero, bela Supo!
 Sup' de l' vespero, bela Supo!
 Be—la Su—po!
 Be—la Su—po!
 Su—up' de l' ves—pe—ro,
 Bela, bela Supo!*

*Bela kaj varma! Vi tre dolus
 Se vi alian manĝon volus.
 Kiu ne donus ĉion por du p
 encoj nur da Bela Sup'?
 Pencoĵ nur da Bela Sup'?
 Be—la Su—po!
 Be—la Su—po!
 Su—up' de l' ves—pe—ro,
 Bela, bela SUPO!*

“Denove la refrenon!” kriis la Grifo, kaj la Falsĥelonio ĵus komencis ripeti ĝin, kiam la krio “Komenciĝas la proceso!” aŭdiĝis el for.

“Venu!” kriis la Grifo, kaj, prenante Alicon per la mano, ĝi forrapidis sen atendi la finon de la kanto.

“Kiu proceso?” Alico anhelis dum ŝi kuris; sed la Grifo nur respondis “Venu!” kaj kuris des pli rapide, dum pli kaj pli fade venis, portate de la venteto sekanta ilin, la melankoliaj vortoj:—

*Su—up’ de l’ ves—pe—ro,
Bela, bela Supo!*

ĈAPITRO XI

KIU ŜTELIS LA TORTETOJN?

LA Reĝo kaj Reĝino de Keroj sidis sur sia trono kiam ili alvenis, kaj granda amaso da uloj ĉirkaŭis ilin—ĉiaj malgrandaj birdoj kaj bestoj, kaj ankaŭ la tuta kartaro: la Bubo staris antaŭ ili, ĉenite, kaj ĉiuflanke de li estis soldato gardanta lin; kaj proksime al la Reĝo estis la Blanka Kuniklo, kun trumpeto en unu mano, kaj pergamena rulaĵo en la alia. En la mezo mem de la kortego estis

tablo, sur kiu estis granda telero da tortetoj: ili estis tiom allogaj ke rigardo al ili malsatigis Alicon—“Ili rapidu fini la proceson,” ŝi pensis, “kaj disdonu la manĝaĵojn!” Sed ŝajne tio ne okazos; do ŝi komencis ĉirkaŭrigardi ĉion por pasigi la tempon.

Alico neniam antaŭe estis en tribunalejo, sed ŝi legis pri ili en libroj, kaj ŝin plezurigis ke ŝi scias la nomon de preskaŭ ĉio tie. “Jen la juĝisto,” ŝi diris al si, “pro lia granda peruko.”

Efektive, la juĝisto estis la Reĝo; kaj, ĉar lia krono estis sur lia peruko (rigardu la antaŭbildon se vi volas vidi kiel li faris tion), li aspektis tute ne komforta, kaj certe ĝi ne beligis lin.

“Kaj jen la ĵuriejo,” pensis Alico, “kaj tiuj dek du uloj,” (ŝi devis diri “uloj”, komprenu, ĉar kelkaj el ili estis bestoj, kaj kelkaj estis birdoj), “mi supozas ke ili estas la ĵurio. Ŝi diris ĉi tiun vorton

al si du- aŭ tri-foje, kaj iom fieris pro ĝi: ĉar ŝi opiniis, tute prave, ke tre malmultaj knabinetoj ŝiaaĝaj scias ĝian signifon. Tamen, “juĝantoj” tute sufiĉus.

La dek du ĵurianoj ĉiuj okupis sin per skribado sur ardezojn. “Kion ili faras?” Alico flustris al la Grifo. “Ankoraŭ estas nenio skribinda, ĉar la proceso ankoraŭ ne komenciĝis.”

“Ili skribas siajn nomojn,” la Grifo flustris responde, “por ne forgesi ilin antaŭ la fino de la proceso.”

“Stultuloj!” Alico komencis per laŭta indigna voĉo, sed ŝi eksilentis haste, ĉar la Blanka Kuniklo kriis, “Silentu en la kortego!” kaj la Reĝo surmetis siajn okulvitrojn kaj maltrankvile ĉirkaŭrigardis por trovi kiu parolas.

Alico povis vidi, egale bone kiel se ŝi transrigardus iliajn ŝultrojn, ke ĉiuj ĵurianoj skribas “Stultuloj!” sur siajn ardezojn, kaj ŝi eĉ povis rimarki ke unu el ili ne scias

literumi “stult-”, kaj ke li devis peti helpon de sia apudulo. “Bele malordaj estos iliaj ardezoj, ĝis la fino de la proceso!” pensis Alico.

Unu el la ĵurianoj havis kraĵonon grincantan. Tion, kompreneble, Alico *ne* povis toleri, kaj ŝi iris ĉirkaŭ la tribunalon kaj ekstaris malantaŭ li, kaj tre baldaŭ ŝi trovis oportunon forpreni ĝin. Ŝi faris tion tiom rapide ke la kompatinda ĵurianeto (Vilĉjo, la Lacerto) tute ne povis kompreni kio okazis; do vane serĉinte ĝin, li devis skribi per fingro dum la resto de la tago; kaj tio malmulte utilis, ĉar ĝi ne lasis signojn sur la ardezo.

“Heroldo, legu la akuzon!” diris la Reĝo.

Je tio la Blanka Kuniklo trifoje sonigis la trumpeton, poste malrulis la pergamenan rulaĵon, kaj legis ĉi tion:—



*Reĝino Kera dum tag' somera
Tortaron faris ŝi:
Kaj Bubo Kera dum tag' somera
Li ŝtelis tortojn, li'!*

“Decidu vian verdikton,” la Reĝo diris
al la ĵurio.

“Ankoraŭ ne! Ankoraŭ ne!” la Kuniklo haste interrompis. “Multo devos okazi antaŭ tio!”

“Alvoku la unuan atestanton,” diris la Reĝo; kaj la Blanka Kuniklo trifoje sonigis la trumpeton kaj kriis, “Unua atestanto!”

La unua atestanto estis la Ĉapelisto. Li venis tenante tetason per unu mano kaj iom da pano-kun-butero per la alia. “Pardonu, via Moŝto,” li komencis, “ke mi enportis ĉi tion; sed mi ne jam plenfinis mian tepaŭzon kiam oni alvokis min.”

“Vi devus esti fininta,” diris la Reĝo. “Kiam vi komencis?”

La Ĉapelisto rigardis la Martan Leporon, kiu lin sekvis en la kortegon, brak’-en-brake kun la Gliro. “La dek-kvaran de marto, mi *kredas* memori,” li diris.

“La dek-kvinan,” diris la Marta Leporo.

“La dek-sesan,” diris la Gliro.

“Notu tion,” la Reĝo diris al la ĵurio, kaj la ĵurio fervore skribis ĉiujn tri datojn

sur siajn ardezojn, kaj poste adiciis ilin kaj konvertis la respondon al ŝilingoj kaj pencoj.⁸

“Deprenu vian ĉapelon,” la Reĝo diris al la Ĉapelisto.

“Ĝi ne estas mia,” diris la Ĉapelisto.

“*Ŝtelita!*” la Reĝo kriis, turnante sin al la ĵurio, kiuj tuj faris noton pri tiu fakto.

“Mi havas ilin por vendado,” la Ĉapelisto aldonis kiel klarigon: “mi mem ne posedas ilin. Mi estas ĉapelisto.”

Nun la Reĝino surmetis siajn okulvitrojn kaj komencis firme rigardi la Ĉapeliston, kiu paliĝis kaj malkvietiĝis.

“Diru vian ateston,” diris la Reĝo; “kaj ne nervozu, alie mi tuj ekzekutigos vin.”

Ŝajne tio tute ne kuraĝigis la atestanton: li daŭre balancis de unu piedo al la alia, rigardante maltrankvile la Reĝinon, kaj pro sia konfuziĝo li elmordis grandan pecon de sia tetaso anstataŭ de sia pano-kunbutero.

⁸ Laŭ la tiama sistemo en Britio, oni sumigis monon per iom kompleksa kalkulado: 12 pencoj = 1 ŝilingo, 20 ŝilingoj = 1 pundo. Se oni supozas ke ĉiu tago = 1 penco, $14+15+16 = 45$ pencoj = 3 ŝilingoj plus 9 pencoj.

Ĝuste tiumomente Alico havis tre kuriozan senton, kio multe perpleksis ŝin ĝis ŝi ekkonsciis pri kio temas: ŝi komencas rekreski, kaj unue ŝi pensis ekstari kaj foriri el la kortego; sed duapense ŝi decidis resti dum restos sufiĉa spaco por ŝi.

“Ne tiom premu,” diris la Gliro, kiu sidis apud ŝi. “Mi apenaŭ povas spiri.”

“Mi ne kulpas,” diris Alico tre humile: “mi kreskas.”

“Vi ne rajtas kreski *ĉi tie*,” diris la Gliro.

“Ne diru absurdaĵojn,” diris Alico pli kuraĝe: “vi bone scias ke ankaŭ vi kreskas.”

“Jes, sed *mi* kreskas normale,” diris la Gliro: “ne kiel vi.” Kaj li levis sin tre paŭte kaj transiris al la alia flanko de la kortego.

Tutdume la Reĝino ne ĉesis rigardadi la Ĉapeliston, kaj, ĝuste kiam la Gliro transiris la kortegon, ŝi diris al unu el

la kortegoficistoj, “Alportu la liston de la kantistoj en la plejlasta koncerto!” je kio la mizera Ĉapelisto tiom tremis ke li

deskuis ambaŭ ŝuojn.



“Diru vian ateston,” la Reĝo ripetis kolere, “alie mi ekzekutigos vin, negrave ĉu aŭ ne vi nervozas.”

“Mi estas povrulo, via Moŝto,” la Ĉapelisto komencis, per tremanta voĉo, “kaj mi apenaŭ komencis mian tetrinkon—antaŭ nur eble unu semajno, aŭ eble du—kaj ĉar la pano-kun-butero tiom maldikiĝis, kaj la teo scintilis—”

“La *kio* scintilis?” diris la Reĝo.

“*Komenciĝis* per la t...,” la Ĉapelisto balbutis.

“Kompreneble ‘teo’ komenciĝas per T!” diris la Reĝo akre. “Ĉu vi opinias min stulta? Daŭrigu!”

“Mi estas povrulo,” la Ĉapelisto daŭrigis, “kaj preskaŭ ĉio scintilis post tiam—tamen la Marta Leporo diris—”

“Mi ne diris!” la Marta Leporo interrompis tre rapide.

“Jes ja!” diris la Ĉapelisto.

“Mi neas tion!” diris la Marta Leporo.

“Li neas tion,” diris la Reĝo: “ellasu tiun parton.”

“Nu, almenaŭ la Gliro diris—” la Ĉapelisto daŭrigis, maltrankvile igardante por trovi ĉu ankaŭ li neos: sed la Gliro neis nenion, ĉar li profunde dormadis.

“Kaj poste,” daŭrigis la Ĉapelisto, “mi tranĉis iom pli da pano-kun-butero—”

“Sed kion diris la Gliro?” ĵuriano demandis.

“Tion mi ne memoras,” diris la Ĉapelisto.

“Vi *devas* memori,” komentis la Reĝo, “alie mi ekzekutigos vin.”

La mizera Ĉapelisto faligis sian tetason kaj panon-kun-butero, kaj surgenuiĝis. “Mi estas povrulo, via Moŝto,” li komencis.

“Vi *tre* povre *parolas*,” diris la Reĝo.

Nun kobajo hurais, kaj lin tuj subpremis la oficistoj de la kortego. (Ĉar tio estas iom malfacila vorto, mi klarigu al vi precize kiel oni faris tion. Oni havis grandan kanvasan sakon, kies malfermaĵo estis kuntirebla per ŝnuro: en tion ili glitigis la kobajon, kapantaŭen, kaj poste ili sidis sur ĝi.)

“Mi ĝojas ke mi vidis tion,” pensis Alico. “Mi tre ofte legis en la ĵurnaloj, je la fino de procesoj, ‘Tuj volis aplaŭdi, sed tion tuj subpremis la oficistoj de la kortego’, kaj antaŭ nun mi neniam komprenis.”

“Se vi ne scias pli pri la afero, vi rajtas substari,” daŭrigis la Reĝo.

“Mi ne povas substari,” diris la Ĉapelisto: “mi jam staras sur la planko.”

“Do vi rajtas *subsidi*,” la Reĝo respondis.

Nun la alia kobajo hurais, kaj oni subpremis lin.



“Nu, jen la fino de la kobajoj!” pensis Alico. “Nun ni progresos pli facile.”

“Mi preferus fini mian tetrinkon,” diris la Ĉapelisto, maltrankvile rigardante la Reĝinon, kiu legadis la liston de kantistoj.

“Vi rajtas foriri,” diris la Reĝo, kaj la Ĉapelisto haste foriris el la kortego, kaj eĉ ne atendis por surmeti siajn ŝuojn.

“—kaj ekstere senkapigu lin,” la Reĝino

aldonis al unu el la oficistoj; sed la Ĉapelisto jam estis nevidebla antaŭ ol la oficisto povis atingi la pordon.

“Alvoku la sekvan atestanton!” diris la Reĝo.

La sekva atestanto estis la kuiristino de la Dukino. Ŝi tenis la piprujon en sia mano, kaj Alico jam divenis kiu estas antaŭ ol ŝi eĉ eniris la kortegon, pro la subita kunekternado de la homoj proksimaj al la pordo.

“Diru vian ateston,” diris la Reĝo.

“Rifuzas,” diris la kuiristino.

La Reĝo maltrankvile rigardis la Blankan Kuniklon, kiu diris, nelaŭtavoĉe, “Via Moŝto devas ekzameni *ĉi tiun* atestanton.”

“Nu, se mi devas, mi do devas,” la Reĝo diris per melankolia tono, kaj, kunfaldinte siajn brakojn kaj sulkiginte la frunton ĝis liaj okuloj preskaŭ malaperis, li diris, per basa voĉo, “El kio konsistas tortetoj?”

“Pipro, plejparte,” diris la kuiristino.

“Melaso,” diris dormema voĉo malantaŭ ŝi.

“Kolumu tiun Gliron!” la Reĝino elkriaĉis. “Senkapigu tiun Gliron! Forsendu tiun Gliron el la kortego! Subpremu lin! Pinĉu lin! Senlipharigu lin!”

Dum pluraj minutoj la tuta kortego estis plena de konfuzo, pro la tasko elirigi la Gliron, kaj, kiam ili fine retranskviliĝis, la kuiristino jam malaperis.

“Ne gravas!” diris la Reĝo, evidente multe pli bonhumora nun. “Alvoku la sekvan atestanton.” Kaj, li pludiris, nelaŭtavoĉe al la Reĝino, “Vere, karulino, nepre *vi* ekzamenu la sekvan atestanton. Tute dolorigas mian frunton!”

Alico rigardis la Blankan Kuniklon dum li mallerte manipulis la liston, sentante grandan scivolon pri kia estos la sekva atestanto, “—ĉar ili *ankoraŭ* ne trovis multan ateston,” ŝi diris al si. Imagu ŝian surpriziĝon, kiam la Blanka Kuniklo laŭtleĝis, plejlaŭte per sia akra voĉeto, la nomon “Alico!”

ĈAPITRO XII

ATESTAS ALICO

“JEN mi!” kriis Alico, tute forgesante, pro la momenta konfuzo, kiom granda ŝi fariĝis dum la ĵuspasintaj kelkaj minutoj, kaj ŝi levis sin tiom rapide ke ŝi renversis la ĵuriejon per la rando de sia jupo, kaj tiel disĵetis ĉiujn ĵurianojn sur la kapojn de la suba rigardantaro, kaj ili kuŝis tie diskuŝante, kio memorigis ŝin tre forte pri ujo da orfiŝoj kiun ŝi akcidente renversis dum la antaŭa semajno.

“Ho, mi pardonpetegas!” ŝi kriis tre malfeliĉe, kaj ŝi komencis repreni ilin kiel eble plej rapide, ĉar la akcidento pri la



orfiŝoj daŭre estis en ŝia menso, kaj ŝi havis ian neklaran ideon ke necesas kolekti ilin tuj kaj remeti en la ĵuriejojn, por ke ili ne mortu.

“La proceso ne povos daŭri,” diris la Reĝo, tre seriozavoĉe, “antaŭ ol ĉiuj ĵurianoj denove estos en sia ĝusta pozicio—*ĉiuj*,” li ripetis tre emfaze, forte rigardante Alicon dum li parolis.

Alico rigardis la ĵuriejon, kaj vidis ke, pro sia hasto, ŝi reenmetis la Lacerton kapsuben, kaj la kompatinduleto skuadis sian voston malankolie, tute ne povante movi sin. Ŝi baldaŭ reelprenis ĝin kaj ĝustigis ĝin; “kvankam ne multe gravas,” ŝi diris al si; “verŝajne ĝi *tute egale* utilis en ĉi tiu proceso kapsupre aŭ kapsube.”

Tuj kiam la ĵurio iom renormaliĝis post la ŝoko de la renversiĝo, kaj iliaj ardezoj kaj krajonoj troviĝis kaj redoniĝis al ili, ili ekkomencis tre diligente skribi historion de la akcidento, escepte de la Lacerto, kiu ŝajne estis tro perpleksita kaj nur povis sidi kun la buŝo malferma, rigardante la plafonon de la kortego.

“Kion vi scias pri ĉi tiu afero?” la

Reĝo diris al Alico.

“Nenion,” diris Alico.

“*Tute* nenion?” persistis la Reĝo.

“Tute nenion,” diris Alico.

“Tio estas tre grava,” la Reĝo diris, turnante sin al la ĵurio. Ili ĵus komencis skribi tion sur siajn ardezojn, kiam la Blanka Kuniklo interrompis: “*Malgrava*, via Moŝto sendube celis diri,” per tre respektoplena tono, sed sulkigante la vizaĝon kaj fimienante al li dum li parolis.

“*Malgrava*, kompreneble, mi celis diri,” la Reĝo haste diris, kaj li pludiris al si per nelaŭta voĉo, “grava—malgrava—malgrava—grava—” kvazaŭ provante ambaŭ vortojn por trovi kiu el ili plejbele sonas.

Kelkaj ĵurianoj skribis “grava,” kaj kelkaj “malgrava”. Alico povis vidi tion, ĉar ŝi estis sufiĉe proksima por rigardi la ardezojn; “sed neniel gravas,” ŝi pensis.

Tiumomente la Reĝo, kiu dum iom da tempo skribadis en sian notlibron, kriis

“Silentu!” kaj li legis el sia libro, “Regulo Kvardek Du. *Ĉiuj personoj pli ol unu kilometron altaj foriru el la kortego.*”

Ĉiuj rigardis Alicon.

“*Mi* ne estas kilometron alta,” diris Alico.

“Jes ja,” diris la Reĝo.

“Preskaŭ du kilometrojn alta,” aldonis la Reĝino.

“Nu, tamen mi rifuzas foriri,” diris Alico; “kaj krome, tiu ne estas normala regulo: vi ĵus inventis ĝin.”

“Ĝi estas la plej malnova regulo en la libro,” diris la Reĝo.

“Do ĝi devus esti Numero Unu,” diris Alico.

La Reĝo paliĝis, kaj rapide fermis sian notlibron. “Decidu vian verdikton,” li diris al la ĵurio, per nelaŭta, tremanta voĉo.

“Ankoraŭ devas aŭdiĝi atesto, bonvolu, via Moŝto,” diris la Blanka Kuniklo, ekstarante tre rapideme; “ĉi tiu folio ĵus troviĝis.”

“Kion ĝi diras?” diris la Reĝino.

“Mi ankoraŭ ne malfermis ĝin,” diris la Blanka Kuniklo, “sed ŝajne ĝi estas letero, verkita de la akuzito al—al iu.”

“Sendube,” diris la Reĝo, “krom se ĝi estas verkita al neniu, kaj tio tute ne estas kutima, sciu.”

“Al kiu ĝi estas adresita?” diris ĵuriano.

“Ĝi tute ne estas adresita,” diris la Blanka Kuniklo; “efektive, tute nenio estas skribita sur la *eksteraĵo*.” Li malfaldis la folion dum li parolis, kaj pludiris, “Efektive ĝi ne estas letero: ĝi estas versoj.”

“Ĉu la manskribo estas de la akuzito?” demandis alia ĵuriano.

“Ne, tute ne,” diris la Blanka Kuniklo, “kaj tio plej perpleksas.” (La ĵurianoj ĉiuj aspektis perpleksaj.)

“Sendube li imitis la skribon de alia persono,” diris la Reĝo. (La ĵurianoj ĉiuj reaspektis feliĉaj.)

“Bonvolu, via Moŝto,” diris la Bubo, “mi ne verkis ĝin, kaj oni ne povas prui

ke mi ja verkis ĝin: neniu nomo estas ĉe la fino.”

“Ke vi ne skribis vian nomon,” diris la Reĝo, “tio nur pli malbonigas la aferon. *Nepre* vi celis miskonduton, ĉar se ne, vi skribus vian nomon kiel ĉiu honestulo.”

Ĝenerala aplaŭdado sekvis tion: ĝi estis la unua vere lerta parolo de la Reĝo dum tiu tago.

“Kompreneble tio *pruvas* lin kulpa,” diris la Reĝino.

“Ĝi neniel pruvas tion!” diris Alico. “Vi eĉ ne scias kion ili diras!”

“Laŭtlegu ilin,” diris la Reĝo.

La Blanka Kuniklo surmetis siajn okulvitrojn. “Kie mi komencu, bonvolu, via Moŝto?”

“Komencu ĉe la komenco,” la Reĝo diris, tre serioze, “kaj plu legu ĝis la fino: tie ĉesu legi.”

La Blanka Kuniklo laŭtlegis ĉi tiujn versojn:—

*Ja, vi vizitis ŝin, laŭ dir',
 menciis min al li.
 Ŝi nomis min honesta vir'
 Sen naĝkapabla sci'.*

*Li diris, mi foriris jam
 (Ni scias: jen la ver'):
 Se pli insistus tiu dam',
 Ĉu morti pro l' afer'?*

*Mi donis unu, ili du,
 Kaj vi eĉ tri aŭ pli;
 De li revenis ili—nu
 jam havis ĉiujn mi.*

*Se mi aŭ ŝi laŭ la hazard'
 Enestus en l' implik',
 Vi liberigu eĉ dum tard-
 o via nin, amik'.*

*Sed jen nocio trafis min
 (Ĝis ŝia ikto) vi
 Obstacle venis ĉiam in-
 ter li, kaj ni, kaj ĝi.*

*Ne sciu ŝi ke ja li plej
 Preferis ilin: ĉar
 Sekreto devas resti, ne
 malkaŝu ĝin klaĉar'.*

“Tiu estas la plej grava atesto kiun ni ĝis nun aŭdis,” diris la Reĝo, kunfrotante siajn manojn; “do nun la ĵurio—”

“Se iu el ili povas klarigi ĝin,” diris Alico, (ŝi tiom kreskis dum la pasintaj kelkaj minutoj ke ŝi tute ne timis interrompi lin), “mi donos al li ses pencojn. *Mi* ne kredas ke estas atomo da signifo en ĝi.”

Ĉiuj ĵurianoj skribis sur siajn ardezojn,

“Ŝi ne kredas ke estas atomo da signifo en ĝi”, sed neniu el ili provis klarigi la folion.

“Se ne estas signifo en ĝi,” diris la Reĝo, “tio ŝparas al ni multegan ĝenon, sciu, ĉar ne necesos serĉi signifon. Tamen, mi ne scias,” li pludiris, etendante la versojn sur sian genuon, kaj rigardante ilin per unu okulo; “mi ŝajne trovas ian signifon en ili, malgraŭe. ‘—*Sen naĝkapabla sci*’—vi ne kapablas naĝi, ĉu?” li pludiris, turninte sin al la Bubo.

La Bubo malfeliĉe kapneis. “Ĉu mi aspektas kapabla?” li diris. (Li nepre *ne* aspektis tia, ĉar li konsistis nur el kartono.)


“Estas bone, ĝis nun,” diris la Reĝo; kaj li plu murmuris la versojn al si: “‘*Ni scias: jen la ver*’—’ temas pri la ĵurio, kompreneble—‘*Mi donis unu, ili du*—’ nu, sendube tion li faris pri la tortetoj, sciu—”

“Sed ĝi ankaŭ diras ‘*De li revenis ili*’,” diris Alico.



“Nu, jen ili!” diris la Reĝo triumfe, indikante la tortetojn sur la tablo. “Nenio estus pli klara ol tio. Sed—‘Ĝis ŝia ikto—’ vin neniam trafis iktoj, kara, mi kredas?” li diris al la Reĝino.

“Neniam!” diris la Reĝino, furioze,



ĵetante inkujon kontraŭ la Lacerton dum ŝi parolis. (Kompatinda eta Vilĉjo jam ĉesis skribi sur sian ardezon per unu fingro,

ĉar li vidis ke ĝi ne lasas signojn; sed li nun rapide rekomencis skribi, per la inko kiu fluadis sur lia vizaĝo, dum ĝi plu fluis.)

“Do la vortoj ne *trafe* priskribas vin,” diris la Reĝo, ĉirkaŭrigardante la aŭskultantojn ridete. Sekvis plena silento.

“Estas vortludo!” la Reĝo pludiris per kolera tono, kaj ĉiuj ekridis. “La ĵurio decidu la verdikton,” la Reĝo diris, eble jam la dudekan fojon tiutage.

“Ne, ne!” diris la Reĝino. “Unue la kondamno—nur poste la verdikto.”

“Vi parolas absurde!” diris Alico laŭte. “Kiel oni povas unue kondamni?”

“Silentu!” diris la Reĝo, purpuriĝante.

“Mi rifuzas!” diris Alico.

“Senkapigu ŝin!” la Reĝino kriegis kiel eble plej laŭte. Neniu moviĝis.

“Kiel vi gravas?” diris Alico (jam ŝi reatingis sian naturan altecon). “Vi estas nur pako da kartoĵ!”



Je tio la tuta kartaro ekleviĝis en la
aeron, kaj iris fluge kontraŭ ŝin; ŝi krietis,

parte pro timo kaj parte pro kolero, kaj klopodis forbati ilin, kaj trovis sin kuŝanta sur la bordo, kun la kapo sur la genuoj de ŝia fratino, kiu milde debrosis kelkajn mortajn foliojn kiuj falis de la arboj sur ŝian vizaĝon.

“Vekiĝu, Alico kara!” diris ŝia fratino. “Nu, vi ja longe dormis!”

“Ho, mi havis tre kuriozan sonĝon!” diris Alico, kaj ŝi rakontis al sia fratino, kiom permesis ŝia memoro, ĉiujn strangajn Aventurojn kiujn vi ĵus legis; kaj, kiam ŝi finis, ŝia fratino kisis ŝin kaj diris, “*Vere* estis kurioza sonĝo, kara: sed nun kuru en la domon por manĝi; malfruiĝas.” Do Alico stariĝis kaj forkuris, pensante dum la kuro, laŭeble, pri kia mirinda sonĝo ĝi estis.



Sed ŝia fratino plu sidis ĝuste kiel ŝi lasis ŝin, kun la kapo apogata de la mano, rigardante la malleviĝantan sunon, kaj pensante pri malgranda Alico kaj ĉiuj ŝiaj mirindaj Aventuroj, ĝis ankaŭ ŝi komencis kvazaŭ sonĝi, kaj jen ŝia sonĝo:—

Unue ŝi sonĝis pri malgranda Alico mem: denove la manetoj estis kunmetitaj ĉirkaŭ la genuo, kaj la brilantaj fervoraj okuloj rigardis ŝiajn—ŝi povis aŭdi la tonojn mem de ŝia voĉo, kaj vidi tiun kuriozan kapskueton por reteni la vagantajn harojn kiuj *insiste* eniris ŝiajn okulojn—kaj dum ŝi aŭskultis, aŭ ŝajnis aŭskulti, la tuta ĉirkaŭa loko ekvivis per la strangaj uloj de la sonĝo de ŝia malgranda fratino.

La longa herbo susuris ĉe ŝiaj piedoj dum la Blanka Kuniklo preterkuris—la timoplena Muso plaŭdis tra la apuda lageto—ŝi povis aŭdi la bruon de la tetasoj dum la Marta Leporo kaj liaj amikoj partoprenis sian neniamĉesantan manĝeton, kaj la akra voĉo de la Reĝino ordonis ke ŝiaj povraj gastoj ekzekutiĝu—denove la porko-bebo ternadis sur la genuo de la Dukino, dum pladoj kaj teleroj disrompiĝis ĉirkaŭe—denove la krio de la Grifo, la grincado de la ardezkrajono de la Lacerto, kaj la malfacila spirado de la subpremitaj kobajoj, plenigis la aeron, konfuzite kun la fora plorado de la mizera Falsĥelonio.

Tiel ŝi plusidis, kun fermitaj okuloj, kaj duone kredis sin en Mirlando, kvankam ŝi sciis ke per malfermiĝo de la okuloj ĉio refariĝus la senekscita realo—la herbo estus nur la susurado de la vento, kaj la plaŭda lageto estus la balancado de la kanoj—la bruetantaj tetasoj fariĝus la

tintantaj sonoriletoj sur la safoj, kaj la akraj krioj de la Reĝino fariĝus la voĉo de la ŝafgardista knabo—kaj la terno de la bebo, la kriaĉo de la Grifo, kaj ĉiuj aliaj strangaj bruoj, ŝanĝiĝus (ŝi sciis tion) en la konfuzitan bruon de la multokupa brutokampo—kaj la muĝado de la foraj brutoj anstataŭigus la pezajn plorĝemojn de la Falsĥelonio.

Laste, ŝi bildigis al si ke tiu sama fratineto ŝia, poste, mem estos kreskinta virino; kaj ke ŝi gardos, dum ĉiuj siaj maturaj jaroj, la simplan kaj amantan koron de ŝia infanaĝo: kaj ke ŝi grupigos ĉirkaŭ sin aliajn malgrandajn infanojn, kaj briligos kaj fervorigos *iliajn* okulojn per multaj strangaj rakontoj, eble eĉ per tiu songo pri Mirlando de longe antaŭa tempo: kaj ke ŝi kunsentos kun ĉiuj iliaj simplaj malfeliĉoj, kaj plezuriĝos pro ĉiuj iliaj simplaj ĝojoj, kaj memoros sian propran infanaĝon, kaj la feliĉajn somertagojn.